

Usona **Esperantisto**

Bulteno de Esperanto-USA - Nº 2026:1



Sur la ruĝa tapiŝo

Fotinto: Audrey DEITZ

Anoncoj	p.4
Premio Maertens 2026: Komunikado de la ĵuĝkomisiono • Rezultoj de aŭtuna membro-enketo • Kanada Lumo 2025:3-4 • 1-a Kongreso de Virinoj • 9-a Afrika Kongreso • 2026 Plaĝa semajnfino • Internacia traduk-konkurso "Vejdo" • UEA subtenas iniciaton "Monto Zamenhof"	
Redakciaj rimarkoj: Demisio	p.9
de la redakcio • LUKA HALL	
Intervjuo kun la nova Program-Administranto de E-USA	p.9
intervjuo Ekkonu Hayden HENDRICKS, la plej novan aldoniton al la Centra Oficejo!	
2025 K4 Financa ĝisdatigo	p.11
de la kasisto • MATT BROOKS Jarfina financa raporto por la fermo de 2025.	
Recenzo de <i>Postcards, Translators, and Esperanto Pioneers</i>	p.12
libroj • KARTER WILLIAMS Nova libro rilata al Esperanto aperis en Novembro 2025. Sed ĉu ĝi estas leginda?	
La kvina kina jaro	p.13
kino • ALEKSO MILLER La iniciatoro de la Usona Bona Film-Festivalo skribas pri ĝiaj historio kaj progreso en la pasintaj kvin jaroj.	
De prokrastado al la ruĝa tapiŝo	p.14
loke • DAVID BECK Rakonto pri la lastatempa ruĝtapiŝa evento en Atlanto.	
Kiel liberigi vian internan unukornulon	p.17
beletre • TIMOTHY BORONCZYK <i>"Ju pli la mistero restis nesolvita, des pli ĝi okupis la pensojn de s-ro Sanders."</i>	
La porró	p.18
kulturo • HAYDEN HENDRICKS Oni ne ĉiam trinkis vinon kaj bieron kiel hodiaŭ.	
Esperanta Dankfestoj en Yosemite	p.19
kongresaj raportoj • DAVID BECK La bela valo Yosemite estis la fono de esperanta dankfesta kunveno en 2025.	
Tradukado de NES-videoludoj al Esperanto	p.23
ludoj • TIMOTHY BORONCZYK Eseo pri la surprize kompleksa procezo por venigi nian plej ŝatatan lingvon al niaj plej ŝatataj klasikaj videoludoj.	
Frua adoptanto de teknologio	p.26
eseo • EFRÁIN PEDROZA Kiajn aplikojn havas trifalda poŝtelefono?	
La mondo bezonas nin	p.27
informado • ALENA ADLER Kiel usonaj esperantistoj povas fari bonon en la mondo hodiaŭ?	

Anoncoj

Premio Maertens 2026: Komuniko de la juĝkomisiono

La Premio Grégoire Maertens celas premii esperantistajn organizaĵojn aŭ individuojn, kiuj per siaj realigoj grave kontribuis kaj plukontribuos al la evoluigo de la Esperanto-movado. Pri la ricevantoj de la premio decidas komisiono konsistanta el eksaj prezidantoj de UEA, eventuale kun la kunlaboro de aliaj eksaj estraranoj de UEA.

Malsame al aliaj movadaj premioj, la Premio Maertens metas emfazon ne nur al la jamaj atingoj, sed ankaŭ al la potencialaj estontaj kontribuoj de la premiito; simbole, oni anoncas ĝin en la unua tago de la nova jaro — kiu ankaŭ, nehazarde, estas la naskiĝtago de la nomdoninto.

La Premio Grégoire Maertens por la jaro 2026 estas aljuĝita al:

Alekso Miller

pro lia rimarkinda laboro sur la kampo de la Esperanta video-arto, kiu malfermas novajn vojojn en la informado, instruado, uzado kaj ĝuado de la lingvo.

Kreskinta en la usona ŝtato Minesoto, Alekso diplomiĝis en orienta Usono pri teatro kaj nun loĝas en Atlanto, Georgio. Tiu urbo estas la dua grava centro de filmproduktado en Usono, kaj Alekso ne nur aktoras en diversaj filmoj kaj teatraj prezentoj, sed akiris la necesajn kapablojn por mem reĝisori kaj produkti filmojn, kadre de vigla loka komunumo de kin-laboristoj. Konatiĝinte kun Esperanto en 2013, kaj spertante ĝian vivantecon en la somera kursaro NASK en 2016, li ekvidis en ĝi invitan terenon por videokreado. Inter liaj multaj kontribuoj al la evoluigo de tiu kampo, elstaras la jenaj:

- la jutuba kanalo Exploring Esperanto (“Esplori Esperanton”), jam kun pli ol 380 videoj kaj 8200 abonantoj;
- la Usona Bona Film-Festivalo, kiu jam atingis sian 7-an eldonon kun pli ol 200 filmoj el la tuta mondo, el kiuj la plej populara atingis jam pli ol 63.000 spektajn;
- la realigo de plena profesinivela filmo de la teatraĵo “1910” el la Universala Kongreso en Montrealo en 2022.

Ĉiu el tiuj diversaj projektoj estas mem plurfaceta, servante kiel modelo kaj inspiro por vastiĝanta filmkulturo en Esperanto. Ekzemple, la videoj ĉe Exploring Esperanto uzas diversajn formatojn, inkluzive de mallongaj vertikalaj

videoj por tre mallongaj “kapsulaj” videoj (multaj el tiuj estas pri la ĝusta vortouzo de iu Esperanta vorto). La filmoj estas ĉiaspecaj: jen distraj, jen edukaj, jen plene esperante, jen angle kun esperantaj subtekstoj. Estas aŭdiolibroj, atentokaptaj mallongaj filmoj, estas registraĵoj de koncertoj, skeĉoj, improvizaj humuraĵoj. La vicleco kaj vario en si mem kreas allogan bildon pri la lingvo kaj ĝia kulturo.

Prizorgante la Film-Festivalon, en kiu partoprenas homoj el la tuta mondo, Alekso ankaŭ helpis plibonigi la filmojn kvalite, per konsiloj kaj praktika helpo, same per prelegoj pri filmado, muntado, redaktado de sono, ktp. Li krome zorgis, ke la Festivalo ne dependu de li, kaj efektive la lastaj du eldonojn organizis aliaj, dum li mem plu senlace kuraĝigas kaj subtenas kaj la organizantojn kaj hezitemajn filmemulojn. Enplektante siajn aktorajn amikojn kaj konatojn en la produktado de filmoj en Esperanto, li cetere signife popularigis la lingvon en la Atlanta kino-komunumo.

Pinto de tiu filmproduktado ĝis nun estas la filmo de la originala teatraĵo “1910”, por kiu Alekso utiligis kvar kameraojn, redaktis la sonon, kaj faris la finan muntaĵon, inkluzive de intervjuetoj kun la aktoroj kaj la verkistino Ĵenja Amis. La fina produkto estas spektebla ĉe lia jutuba kanalo (jam 7300 spektaj). Tamen, kredante je la valoro de fizikaj realigoj, disvastigeblaj sendepende de la retaj entreprenoj, Alekso krome pretigis la filmon por eldono sur Blu-radia disko kun multaj aldonaĵoj kaj subtitoloj en ok lingvoj. Pri ties eldono nun respondecas Esperanto-USA.

Per sia talenta laboro, Alekso Miller signife plialtigas la nivelon de la Esperanta filmkulturo kaj sendube stimulas ĝian pluan evoluon en la venontaj jaroj. La aljuĝo de la dua Premio Grégoire Maertens, kun mona subteno de 1000 €, celas rekoni lian elstaran kaj daŭrontan kontribuon.

En la jutubkanalo de UEA eblas spekti intervjuon inter la premiito kaj Mark FETTES, eksa prezidanto de UEA kaj ano de la juĝkomisiono. La intervjuo estas publike spektebla ekde la 1-a de Januaro 2026.

[youtube.com/watch?v=IncoMT6YmdY](https://www.youtube.com/watch?v=IncoMT6YmdY)

Rezultoj de aŭtuna membro-enketo

Peggy DOLTER

Per nia nova retejo por membroj de E-USA — *Springly* — en aŭtuno 2025 ni invitis respondojn al pluraj demandoj. Entute 92 membroj respondis, el 388 kiuj povintus fari.

Dankon al ĉiuj, kiuj pasigis kelkajn minutojn por plibonigi nian organizaĵon! Plenaj rezultoj aperos en nia jarraporto por 2026, disdonota ĉe nia kongreso ĉi-somere. Tamen, jen mallonga resumo de la rezultoj.

Ĝenerale, estis aprobo por la bulteno *Usona Esperantisto*. La plej utilaj rubrikoj estis tiuj pri okazontaj eventoj, agadoj ĉe lokaj kluboj, kaj pri gramatiko. Ĉiuj rubrikoj ricevis pli da subtenantoj ol malsubtenantoj. El la respondintoj, la plejparto preferis la presitan, paperan, version de la bulteno.

Pri landaj kongresoj, multaj ne esprimis postulojn. Sed inter tiuj kiuj respondis, gravis malmultekostaj loĝado kaj vojaĝado. Cetere, havi NASK-on en la sama loko estis alloge.

La retmesaĝoj kiujn ni ricevas de la Centra Oficejo kutime estas dulingvaj, kaj tio plaĉis al la plejmulto de la respondintoj.

Pri nia nova retbutiko, la plej populara peto estis pli da origine esperantlingvaj verkoj.

Pri komunikado inter membroj, se ni esperis trovi klaregan vojon, ni seniluziiĝis. Kelkaj preferis nian Discord-kanalon, sed la sama kvanto preferis nian Telegram-grupon, Amikoj de E-USA. En la komentoj, respondintoj proponis 11 aliajn sociajn retojn.

Denove, dankon al ĉiuj, kiuj plenumis la formularon. En nia jarraporto pli da detaloj estos pritraktataj. Ĝis tiam!

Notu: Se vi estas membro ĉi-jara kaj vi ne rimarkas ke la Centra Oficejo fojfoje sendas retmesaĝojn, bonvolu certigi ke via spamujo ne enhavas mesaĝojn de E-USA (app@emails-springly.org).

Kanada Lumo 2025:3-4

Ĵenja AMIS

<esperanto.ca/wp-content/uploads/2025/12/
Lumo_2025-3-4.pdf>

Jen la plej nova numero de “Lumo”, kaj la lasta sub mia redaktado (la torĉon transprenos nia kara amiko kaj samurbano, Garry EVANS, aka kiel “s-ro Mann” de la teatraĵo “1910”). Tiu ĉi numero estas aparte bunta! Atendas vin profunda esploro de la temo Esperanto kaj kinoarto. Mi dediĉis ĝin al tiu temo pro la apero de nova kanada profesia filmo en Esperanto, “Himalia” — projekto, en kiu partoprenis multaj anoj de Esperanto-Societo Kebekia kaj kies rezulto estas absolute brila (eŭropanoj, atentu! Vi povas spekti ekde la 7-a de januaro rete en la kanalo [Arte.tv](https://www.arte.tv) - diskonigu)! Vi legos plurajn artikolojn pri la granda evento de la jaro — la Dulanda Kongreso. Kiel ĉiam atendas vin pluraj aliaj artikoloj kaj literaturaj kontribuoj.

La redakcio de *Usona Esperantisto* sendas al Ĵenja siajn bondezirojn kaj dankojn pro ŝiaj ses jaroj da elstara laboro kaj pro la afabla kunlaborado inter niaj revuoj! Krome ni varme bonvenigas Garry, kiu prenas la stafeton.

1-a Kongreso de Virinoj

La Komisiono de UEA pri Virina Agado okazigos kongreson kun la temo:

“Virinoj, povoplenaj homoj”

Tio estas la temo elektita de la Komisiono. Prelegoj, debatoj, filmoj, ebligas al ĉiuj, viroj kaj virinoj kune, interŝanĝi ideojn, emociojn, faktojn kaj fantaziojn.

La bunteco de niaj originoj kreos riĉan bildon pri la vivo de la virinoj en la mondo.

Ni diru *Kongreso de Virinoj*, mallongigo KV, ĉar la Komisiono provas *kovi* pozitivajn agadojn. Ne estos virtuala kongreso, tamen ni *vokas* al abunda partopreno. Estos ĉeesta fizika vigla renkontiĝo inter viroj kaj virinoj el diversaj horizontoj.

La kongreso okazos la 30-an kaj 31-an de Julio 2026 - ĵaŭde kaj vendrede antaŭ la 111-a Universala Kongreso de Esperanto en Graz, Aŭstrio.

La retadreso virina-agado@groups.io estas je via dispono.

La detaloj kaj aliĝeblo aperos kiel antaŭkongreso en la Dua Bulteno de la UK.

La evento troviĝas ĉe Eventa Servo.

<eventaservo.org/e/virinoj2026>

Togolanda ministro fariĝas la alta protektanto de la 9-a Afrika Kongreso de Esperanto

La Organiza Komitato de la 9-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) kun granda entuziasmo kaj fiero anoncas gravan sukceson por la ĉi-jara tutkontinenta renkontiĝo. Per oficiala letero datita la 18-an de februaro 2026, la Ministro pri Turismo, Kulturo kaj Artoj de Togolando, S-ro Isaac Tchiakpe, akceptis fariĝi la Alta Protektanto de la kongreso. La oficiala patroneco de la Ministro Tchiakpe ne nur donas al la kongreso altan diplomatan nivelon, sed ankaŭ konfirmas la malfermitecon de la togolanda registaro al nuntempaj iloj por kultura kaj turisma integriĝo.

La 9-a AKE disvolviĝos de la 26-a ĝis la 31-a de decembro 2026 en la pitoreska urbo Kpalime. Konata pro siaj verdaj montoj, vigla arta sceno kaj gastama loĝantaro, la kongresurbo estas konvena loko por gastigi la partoprenantojn el la tuta afrika kontinento kaj de aliaj partoj de la mondo. Sub la temo “Esperanto, lingva ponto por senlima Afriko”, la 9-a AKE celas esplori kiel la internacia lingvo povas: a) faciligi la komunikadon inter afrikanoj de diversaj lingvaj fonoj; b) konigi kaj valorigi la togolandan kulturon kaj turismon al internacia publiko kaj c) subteni la vizon de unuigita, senlima kaj kunlaboranta Afriko.

En mondo, kie lingvaj baroj ofte malhelpas ekonomian kaj kulturen interŝanĝon, la elekto de Togolando kiel gastiganto de la tutkontinenta evento poziciigas la landon kiel unu el la avangardaj centroj en Afriko por neŭtrala kaj egalececa komunikado, kaj celas honori enlandajn aktivulojn, reliefigi la turisman potencialon de la lando kaj la gastamon de la popolo.

La akiro de tiu ĉi subteno cetere kontribuas al la strategia plano de UEA, AKIRI, aparte al la celo Konsciigo de la kampo Informado kaj al la celo Politika Agnosko de la kampo Rilatoj. UEA kaj la Afrika Komisiono danke salutas la Altan Protektanton de la 9-a AKE kaj afable invitas la afrikajn esperantistojn, same kiel la alikontinentajn esperantistojn, konsideri vojaĝon al Kpalime, la scenejo de “Senlima Afriko”, por la jarfino 2026.

Okazanta regule por plifortigi la ligojn inter la diversaj landaj asocioj, klubanoj, unuopuloj kaj prezenti la progreson de la lingvo en Afriko, la Afrika Kongreso estas la plej grava renkontiĝo de la afrika movado. Ĝi tradicie

kunvenigas partoprenantojn el dudeko da landoj de pli ol unu kontinento.

UEA dankante afable spronas ĉiujn plusendi tiun ĉi komunikon al siaj lokaj komunik-listoj aŭ publikigi ĝin en diversaj revuoj. Bonvenaj estas ankaŭ donacoj por ebligi la partoprenon de junaj lernemaj afrikaj esperantistoj en la Afrika Kongreso. Ĉiu eta subteno havas grandan valoron en la konstruo de pli kaj pli forta afrika E-komunumo. Kaj same grave – se vi ankoraŭ ne registriĝis por la 9-a AKE ne prokrastu tion – bonvolu aliĝi nun, simple kaj rapide, per tiu ĉi reta aliĝformularo:

<<https://mallonge.net/9akeretalighilo>>

2026 Plaĝa semajnfino “Fajro kaj Ondo!”

**Vendredo, la 4-a de septembro ĝis
lundo, la 7-a de septembro, 2026**

Ni invitas vin al evento aranĝita de la grupoj *Esperantistoj en Suda Kalifornio* kaj *Esperantistoj en Oranĝ-kantono*. Dum la semajnfino de la Tago de Laboro, ni invitas vin aliĝi al io vere speciala — komforta kaj neforgesebla kunveno ĉe la plaĝoj de Suda Kalifornio, ĉar estas io



speciala pri kunhavo de tempo, kie la tagoj disvolviĝas nature. Imagu vekiĝon ĉe oceana aero kaj sunlumo — vesperojn kolektiĝante ĉirkaŭ plaĝa fajro dum la suno malaperas en la Pacifikon — tri tagojn por malstreĉiĝi, interkonatiĝi, paroli Esperanton kaj ĝui la vivon kune.

Interesitoj? Demandoj? Ideoj?

Bonvolu kontakti nin! Se estas ia ajn ŝanco, ke vi ĉeestos, sendu retmesaĝon al ni nun. Eĉ provizora intereso helpas nin plani la semajnfinojn kaj ni tre ŝatus aŭdi de vi.

Ni kunhavis montojn.

Ni kunhavis konferencajn ĉambrojn.

Nun ni ĝuu kune la **sunon, sablon, Esperanton, kaj amikecon**.

Aniĝu, kaj helpu nin krei memorindan plaĝan ferieton!

Q.David.Beck@gmail.com



Internacia traduk-konkurso “Vejdo” 2026

Alvoko al la tutmonda esperanta komunumo

UEA kunlabore kun la redakcio de la revuo *Literatura Vivo* kore invitas ĉiujn esperantistojn tra la mondo partopreni en la Internacia Traduk-Konkurso “Vejdo” (2026). La konkurso estas dediĉita al la memoro de Prof. Vejdo (Wei Yida, 1947-2025), honora membro de UEA, kaj celas subteni altkvalitan tradukarton en Esperanto.

Traduko estas unu el la plej noblaj manieroj vivi kaj disvastigi Esperanton. Per traduko ni konstruas pontojn inter kulturoj, transdonas literaturajn trezorojn kaj donas novan vivon al pensoj naskiĝintaj en aliaj lingvoj. La konkurso “Vejdo” celas instigi ĝuste tian respondecan, zorgeman kaj kreeman laboron.

La konkurso, aŭspiciata de UEA, estas malfermita al ĉiuj esperantistoj, sendepende de lando aŭ deveno. Akceptiĝas propraj, manfaritaj tradukoj el iu ajn nacia lingvo en Esperanton: poezio, mallonga prozo, rakontoj aŭ mikronoveloj, kantotekstoj kaj artikoloj aŭ eseoj. Ĉiu partoprenanto rajtas sendi maksimume du verkojn, kun maksimuma longo de 1500 vortoj por ĉiu. Tradukoj faritaj per artefarita intelekto ne estas konsiderataj: ni serĉas la homan voĉon, sentemon kaj stilon de la tradukanto.

La konkursaĵojn bonvolu sendi al info@literaturavivo.com ĝis la 1-a de junio 2026, kun indiko de la originala lingvo, la titolo de la verko kaj viaj kontaktinformoj (nomo, urbo, lando).

Internacia ĵurio, konsistanta el spertaj esperantistoj kun kompetento pri literaturo kaj tradukarto kaj reprezentantaj diversajn lingvojn, elektos la premiitojn: principe estos 1 gajninto por la unua premio (3 libroj), 3 gajnintoj por la dua premio (po 2 libroj) kaj 10 gajnintoj por la tria premio (po 1 libro). La premioj estos provizitaj de UEA kaj la fina rezulto estos solene publikigita dum la 111-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Graz (Aŭstrio) en aŭgusto 2026. Elektitaj verkoj estos publikigitaj en *Literatura Vivo*. La regularon de la konkurso legu en la retejo de *Literatura Vivo*.

Per via partopreno vi ne nur omaĝas la heredaĵon de Prof. Vejdo, sed ankaŭ kontribuas al la estonteco de la Esperanta literaturo. Traduku. Kundividu. Konservu la vivon de la lingvo.

La subteno de UEA al la konkurso Vejdo spegulas la strategian planon AKIRI, aparte la celojn pri komunuma reto kaj komunuma reto kaj kultura fortigo de la kampo Kunlaborado. Kadre de tio UEA ampleksigas sian kulturan agadon al diversaj kulturaj kampoj. En la nomo de UEA kaj de la redakcio de *Literatura Vivo* ni atendas viajn verkojn kun granda intereso. Se vi ankoraŭ ne aliĝis al la 111-a UK, aliĝu per [<uk.esperanto.net>](mailto:uk.esperanto.net).

UEA subtenas iniciaton “Monto Zamenhof”

Civitana iniciato celas per reta petskribo renomi la monton Vaalserberg al **Monto Zamenhof**, honore al la iniciatinto de Esperanto. La monto situanta sur la tripunkto de Nederlando, Belgio kaj Germanio historie situis sur kvarpunkto pro la iama Amikejo, **Neŭtrala Moresnet**. La regiono estas do historie ligita al Esperanto, precipe pro la rolo de D-ro Wilhelm Molly, firmakuracisto de la zinkminejo *Vieille Montagne*. Esperantisto, li aktive subtenis, ke Neŭtrala Moresnet fariĝu sendependa ŝtato kun Esperanto kiel komuna lingvo. Tial UEA invitas ĉiujn simpatiantojn de internacia amikeco subskribi la petskribon kaj kontribui al ĝia diskonigo:

<change.org/p/rename-vaalserberg-to-monto-zamenhof-zamenhofberg-mont-zamenhof>

La petskribon iniciatis la artisto, poligloto kaj esperantisto **Shabi Fiumei**, membro de UEA, kun kiu aperos intervjuo en la revuo *Esperanto*. UEA kunlaboras kun li plurmaniere kaj subtenas la iniciaton kiel kulturan kaj informan agadon. La kunlaboro komenciĝis danke al la Estrarano de UEA pri Kulturo, Zdravka Boytcheva, kiu kaptis la informon pri la petskribo. En 2025 ŝi oficiale partoprenis en la Gebeneluksa Kongreso – mem ekzemplo de internacia kunlaboro – kaj kadre de ĝi, kun granda grupo de esperantistoj, vizitis la Muzeon *Vieille Montagne*.

“Tiu petskribo havas edukan kaj komunikan efikon. Ĝi atentigas pri Zamenhof, pri la internacia heredaĵo de la regiono kaj pri la daŭra aktualeco de la ideo de interkompreniĝo pere de Esperanto. Ĝi interesas turistojn kaj subtenas la lokajn komunumojn. Ĉar ĝi ankaŭ allogas ĵurnalistojn, tial gravas amase subteni ĝin”, deklaris la Prezidanto de UEA, Fernando Maia Jr.

Pri la iniciato jam aperis raporto (kun video) en la belga publika amaskomunikilo **BRF (Belgischer Rundfunk)**. En ĝi Jan Sabri Cetinkaya, direktoro de la Muzeo *Vieille Montagne* en Kelmis, mem prezentas parton de sia mesaĝo en Esperanto. La raporto kaj la video (en la germana; eblas uzi aŭtomatan tradukilon) troveblas ĉe <brf.be/regional/2042935>.

“La kampanjo povos ne sukcesi ŝanĝi la nomon de la monto, sed ĝi paroligas homojn pri Esperanto, kaj tio estas jam sukceso. Estas aparte rimarkinde, ke du neesperantistoj uzas iom da Esperanto por raporti pri ĝi”, komentas la Vicprezidanto de UEA, Seán Ó Riain, respondeca pri Informado kaj komisiita gvidi la kunlaboron kun Shabi Fiumei.

Kadre de tiu kultura kaj informa aliro UEA ankaŭ konsideras subteni la starigon de memoriga Zamenhof/Esperanto-Objekto (ZEO) ĉe la monto, honore al L. L. Zamenhof, kunlabore kun Shabi Fiumei, la koncernaj municipoj kaj partneraj organizaĵoj. Tiu ampleksa subteno kongruas kun la strategio **AKIRI**, aparte kun la prioritato “Konsciigo” de la kampo **Informado**, kiu celas “garantii vastan konscion pri la realo, stato, uzo, utilo kaj potenco de Esperanto” per “fluo de fidindaj informoj al [...] amaskomunikiloj, edukistoj kaj decidfarantoj”. UEA emfazas, ke - sendepende de la fina rezulto de la renomiga propono - la iniciato jam konkrete kontribuas al pli vasta publika atento pri Esperanto, ĝiaj valoroj kaj ĝia historia kaj kultura heredaĵo.

Fino de anoncoj

Redakciaj rimarkoj: Demisio

de la redakcio • Lua HALL

Saluton, karaj legantoj,

Bedaŭroplene mi anoncas mian demision de la redakcio de Esperanto-USA, post du jaroj. La redakcion daŭre portos mia kolego Alena, kaj mi restos en kontakto kun la Centra Oficejo por subteni la transiron, sed ĉi tiu numero estas mia lasta kiel alio ol aŭtoro.

De mia membriĝo en E-USA, mi avide serĉis manierojn servi la landan E-komunumon ene de nia nacia organizaĵo. Efektive mi komencis kiel tiutempa ano de la Komitato pri Komunikado, kaj kiel inaŭgura ĉefo de la Projekta Komitato, kaj mi imagis, ke iun tagon mi celus pozicion en la estraro. Sed vere pri unu respondeco mi revis pli ol ajna alia, kaj mi neniam atendis, ke en nuraj monatoj ĝi vakiĝus.

Kiam la posteno de bulten-redaktisto estis ofertita al mi, tio estis la plej alta honoro en mia esperanta kariero, kaj ĝi plu estas. Mi fiere akceptis, eĉ ne sciante, ke ankaŭ unu alia homo akceptis samtempe, kun kiu mi estis formonta ne nur duonon de redakcia teamo, sed unu el la plej karaj amikecoj en la movado. Tio neniam okazus sen la bulteno por konigi nin, kaj por streĉi niajn lertojn pri kaj la lingvo, kaj la mondo. Pro ĉio ĉi mi estas dankoplena.

La decidon demisii malfaciligis, kaj prokrastis preskaŭ jaron, la elstara administra teamo ĉe E-USA, plena je la plej profesiecaj kaj afablaj homoj, kun kiuj mi iam ajn kunlaboris. Ili reprezentas laŭ mi modelon strebindan por neprofitcela organizaĵo, rilate la kompateman kaj kompreneman trakton al ni kiel laborkontraktantoj. Mi forte esperas, ke venos denove la oportuno kunlabori kun ili iamaniere.

Enfine tamen, mi decidis, ke mi ne plu povas servi kiel redaktoro. Lastatempe, la vivaj cirkonstancoj ŝanĝiĝis kaj miaj prioritatoj devis ŝanĝiĝi kun ili. Simile mi forlasis en Decembro mian pozicion kiel estro de la granda Esperanto-grupo ĉe *Discord*, post kvin jaroj; kaj mi jam buĝetis neniom por kongresi ĉi-jare. Tio tamen ne sugestis, ke mi vidas Esperanton kvazaŭ ludilon rezignendan sub eksteraj premoj — fakte, mi kredas, ke la ligo inter samideanoj en Esperantujo ĵus fariĝis pli grava ol iam antaŭe. Malgraŭ tio, mi mem bezonas ripozon — simple estas “ĝis” kaj ne “adiaŭ”.

Sed antaŭ tio, mi volas enfine danki la usonan esperantistaron, kies subteno faras ĉi tian pasian laboron praktikebla. Unu memoro plej kara estas la neatendita ovacio, kiun la redakcio ricevis ĉe la Dulanda Kongreso en Toronto dum la jarraporto de E-USA; ĉiam mi revis havi hejme E-komunumon simile viglan kiel aliaj kontinentoj, kaj mi ĝojas, ke mi povis eble kontribui al tio, engaĝigante kun aŭtoroj kaj lumigante verkojn plej bonajn — sed vere, ĉio ĉi tute dependas de tiuj verkistoj, kaj ties legantoj. Mi instigas vin daŭre partopreni kaj montri vian subtenon al la redakcio, kiel ajn ĝi konsistas.

Ĝis la revido,

—Lua

Intervjuo kun la nova Program-Administranto de E-USA

intervjuo

Hayden Hendricks estas nia nova Program-Administranto, kiu eklaboris en la Centra Oficejo de Esperanto-USA la 5-an de Januaro 2026. Li servas kiel helpanto al nia Ĝenerala Direktoro, Amanda Schmidt, kiu intervjuis lin por *Usona Esperantisto*.

Amanda: *Saluton Hayden! Bonvolu rakonti al niaj membroj iomete pri vi. Kie vi kreskis, kie vi loĝas nun, ekde kiam vi parolas Esperanton, ktp?*

Hayden: Saluton Amanda! Mi kreskis en antaŭurbo proksima al Fenikso, sed post la mezlernejo, mi translokiĝis al Portlando por miaj bakalaŭraj studoj. Tie mi subite troviĝis en tre internacia medio kaj ekkonsciis, ke mi parolis nur la anglan! Mi neniam konsciis, ke mi estis

unulingvulo, sed tiam mi ekhontis. Ĝis tiam mi simple supozis, ke aliaj homoj iel ajn lernos la anglan, aŭ ke tradukiloj sufiĉos por ĉio. Nun mi vidas, kiom aroganta estis tiu pensmaniero.

Mi turniĝis al Duolingo kaj reprenis mian (konfese pigran) mezlernejan germanan, sed sensukcese. Poste mi provis la japanan (tri skribsistemoj!), la francan, la nederlandan, la grekan, kaj eĉ la latinan. Fine venis la vico de Esperanto.

Pro la afiks-sistemo mi ne devis parkerigi amasegon da radikoj, kaj la kunmetado de afiksoj estis mirinde ludema, kio perfekte kongruis kun la ludigita lingvolernada sistemo de Duolingo. Post unu jaro mi finis la kurson kaj sentis min preta por ekuzi la lingvon!

Tamen, mi trovis neniun lokan esperantiston proksime. Do, mi babilis rete, legis bildstriojn, kaj spektis filmetojn. Nur kiam mi translokiĝis al Barcelono, mi finfine ekparolis esperante. Mi tre dankas la lokajn esperantistojn; ili vere helpis min sentiĝi hejme en nova lando.

Amanda: *Kiel vi aktivis en la movado antaŭ via dungiĝo? Ĉu vi vojaĝis, partoprenis renkontiĝojn? Kion vi pensis pri Esperantujo kaj la homoj kiuj parolis la lingvon?*

Hayden: Mi jam estis sufiĉe aktiva. Mi estas estrarano de la Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ), kie mi organizas monatajn aranĝojn: bierumadojn, ekskursojn, pufmaizajn vesperojn, kaj piknikojn. Mi ankaŭ servas en TEJO kiel Komitatano B, kaj pasintjare mi gvidis TEJO-seminaron en Kipro. Nuntempe mi helpas organizi la venontan IJK-n en Katalunio. (Aliĝu nun!)

Dank' al la stipendio "Partoprenu IJK-n," mi povis vojaĝi al mia unua kongreso. Tio estis belega sperto, kiu instigis min eĉ pli engaĝiĝi. Dum tiu semajno mi konstatis, ke Esperanto donas aliron al tutmonda reto de samideanoj. Eble aliaj komunumoj ofertas similan senton de amikeco kaj aparteno, sed mi neniam spertis ion tian antaŭe. Estis por mi io tute nova, ĉarma, kaj ripetenda.

Esperanto estas unika pro sia internacia etoso. Mi spertis ion similan kiam mi staĝis ĉe Disney World en Orlando, loĝante kun franco, japano kaj brazilano. Estis amuze, sed mi rimarkis, ke ĉiu preferis la lingvon kaj kompanion de siaj samlandanoj. "Simio al simio plaĉas pli ol ĉio," kiel diras la proverbo. Sed en Esperantujo, homoj vere malfermiĝas al aliaj kulturoj. Tiu emo rilati kun homoj el diversaj landoj, kaj la ĝenerala malfermiteco de la homoj, estas tio, kio daŭre allogas min.

Amanda: *Kial vi decidis proponi vin por la posteno de Program-Administranto?*

Hayden: Kvankam mi lernis la lingvon en Usono, mi ne vere eniris la movadon ĝis mia translokiĝo al Barcelono. Imagu, ke la unua fojo, kiam mi parolis kun usona esperantisto, estis dum la IJK en Indonezio! Ĉar mi ne konas multajn usonanojn ĉi tie, mi iom sopiris al mia hejmlando.

Min tre interesas la laboro de E-USA, precipe pro ĝia fokuso al kino. Al Esperantujo mankas distrocela enhavo por junuloj. Ni havas amason da literaturo kaj muziko, sed

ni bezonas pli da bildstrioj, videoludoj kaj filmoj. La dublado de la filmoj de Christopher R. Mihm kaj la serio Pasporto al la Tuta Mondo multe helpis mian propran lernadon. Tial mi opinias, ke la Usona Bona Film-Festivalo estas tiom grava. E-USA havas la rimedojn por plivastigi la uzon de Esperanto en nia lando kaj altiri novajn membrojn, kaj mi volis esti parto de tio. La kvanto da interesaj projektoj disvolvataj de la estraro estas vere mirinda, kaj mi sentas min bonŝanca helpi realigi ilin.

Amanda: *Kiel eblas fari vian laboron de trans la Atlantika Maro?*

Hayden: "Malfruaj noktoj"! Hispanio estas naŭ horojn antaŭ la horzono de nia sidejo en Sakramento, do kunsidoj kutime okazas dum mia nokto. Tamen, la plejparto de miaj taskoj estas nesinkronaj, kaj mi jam adaptis mian horaron al nokta laborado.

Amanda: *Kion vi fakte faras en via posteno?*

Hayden: Nuntempe tio plejparte signifas organizi la ĉi-jaran Landan Kongreson en Klevlando, Ohio (denove: aliĝu!). Krome, mi helpas administri la membro-sistemon *Springly*, elsendi la membro-novaĵleteron, mastrumi la retbutikon kaj ĝisdatigi la retejon. Mi ankaŭ rilatas kun la UN-oficejo kaj serĉas subvenciojn por la organizo.

Amanda: *Ĉu vi ŝatas la laboron? Kial?*

Hayden: Mi nur vidas unu ĝustan respondon...

Verdire, mi tre ĝuas ĝin. Ĉiam estas sufiĉe da taskoj, sed miaj kolegoj estas tiom laboremaj, ke mi neniam sentas min supersarĝita. La taskoj estas tre diversaj, kio permesas al mi lerni novajn kapablojn. Ni estas malgranda teamo, do estas tre kontentige vidi, ke mia laboro havas tujan kaj videblan efikon al la tuta organizo.

Amanda: *Kiuj estas viaj planoj aŭ revoj pri via estonteco kun Esperanto?*

Hayden: Kiel mi menciis, mi revas pri pli da distrocela enhavo. Nia komunumo abundas je talentuloj: programistoj, artistoj, verkistoj, aktoroj. Tro ofte ili laboras izolite. Mi ŝatus helpi kunordigi tiujn fortojn por krei novajn produktaĵojn, kiuj povus allogi eĉ pli da homoj al nia movado.

Amanda: *Ĉu vi havas aliajn rakontojn aŭ komentojn, kiujn vi ŝatus aldoni, ke niaj membroj pli bone konu vin aŭ komprenu vian laboron?*

Hayden: Kvankam mi loĝas malproksime, mi tre ĝojas resti ligita al mia hejmlando per Esperanto. Se vi vidos min ĉe iu renkontiĝo, ne hezitu veni kaj saluti!

2025 K4 Financa ĝisdatigo

de la kasisto • Matt Brooks

La kvara kvaronjaro (K4) estis la kulmino de nia jara laboro. Ĝi estis karakterizita de intensa kaj sukcesa programa agado. Kvankam la ciferoj montras netan operacian deficiton dum ĉi tiuj lastaj tri monatoj, tio estas signo de **sukceso, ne de malforteco**. Ĉi tiu elspezado estis plene planita kaj reprezentas nian decidon investi niajn rimedojn rekte en la Esperanto-komunumon. Nia elstara financa laboro dum la unuaj tri kvaronjaroj ebligis al ni financi nian bultenon, la Usonan Bonan Film-Festivalon, kaj la novajn komunumajn subvenciojn por lokaj grupoj sen riski nian stabilecon. Ni finis la jaron 2025 kiel organizo, kiu ne nur kolektas monon, sed kiu aktive kaj efike uzas kaj elspezas ĝin por siaj celoj.

Investa Agado kaj Monrimedoj

Investoj: Nia investaro ĉe *Morgan Stanley* atingis gravan mejloŝtonon kaj valoris **588 032 \$** je la jarfino. La investosaldoj kreskis je preskaŭ 12% dum la lasta kvaronjaro. Malgraŭ la forta programa agado en K4, niaj investoj garantias al nia organizo longdaŭran stabilecon kaj solidan fundamenton por plia kresko en 2026.

Ankaŭ la **fondaĵo Reed** (angle: *Reed Trust*), kiun E-USA administras, spertis modestan kreskon malgraŭ la trimonataj eltiraĵoj. Ni ĝojas anonci, ke venontjare la plena planita enspezo de la fondaĵo denove subtenos NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro). NASK denove koincidos kun la Landa Kongreso, kio faciligos al niaj membroj partopreni ambaŭ aranĝojn — pliaj detaloj sekvas baldaŭ!

Monrimedoj: Ni finis la jaron en forta pozicio kun **17 320 \$** en tuj alireblaj bankkontoj. Krome, ni transdonis la limigitan donacon de **50 000 \$** de Daniela Power en deponatestilon flekseblan (angle: *flexible CD*). Ĉi tia konto gajnas altan nivelon de interezo por ke la fondaĵo kresku regule, certigante ke ni havos eĉ pli da rimedoj por estontaj kulturprogramoj.

Buĝeto Kompare al Realeco: Sukcesa Jara Bilanco

Jen komparo inter niaj ciferoj de la kvara trimonato:

- **Enspezoj:** 7 967 \$ (Planite: 37 114 \$)
- **Elspezoj:** 34 015 \$ (Planite: 36 337 \$)
- **Neta Rezulto:** -26 048 \$ (Planite: +777 \$)

Analizo de la rezultoj: La diferenco ĉe la enspezoj fontas el tio, ke ni **atingis niajn ĉefajn enspezcelojn pli frue en la jaro** ol antaŭvidite. Pro la elstara kvestado

en K2 kaj K3, ni povis trankvile koncentriĝi pri elspezado por niaj programoj en K4. Ni restis ene de nia elspeza buĝeto, malgraŭ neeviteblaj surprizoj (kiel la kostoj de du numeroj de *Usona Esperantisto* alveninte en unu kvaronjaro).

Tutjara Buĝeta Analizo: Modelo de Stabileco

Se ni rigardas la tutan jaron 2025, Esperanto-USA montris rimarkindan financon fortikecon kaj efikecon. **Ni atingis 14 493 \$ pluson** kompare al la buĝeto. Ĉi tio estas rekta rezulto de nia strategia decido atingi enspezcelojn frue kaj poste saĝe investi tiujn rimedojn en la servojn por niaj membroj.

Nia disciplina laboro permesis al ni fini la jaron kun elspezoj signife sub la tutjara antaŭvido, malgraŭ la alta agado en K4. Ĉi tiu forta bazo ne nur pravas nian bonan administradon, sed ankaŭ permesas al ni komenci 2026 kun fortikigitaj rezervoj.

Administraj Plibonigoj


Dum K4, ni ne nur elspezis por programoj, sed ankaŭ plifortigis nian internan strukturon:

1. **Nova Kontplano:** Ni preparis pli modernan sistemon por 2026 por eĉ pli travidebla raportado al niaj membroj.
2. **Klasifiko de Sendokostoj:** Ni rafinis nian spuradon de kostoj por pli bona efikeco.
3. **Planado por 2026:** Je la komenco de decembro, ni sukcese finpretigis la buĝeton por 2026, certigante ke niaj estontaj financaj prioritatoj estu klare difinitaj kaj tute pretaj por tuja efektivigo.

Rigardante al la Estonteco

Ni fermas la jaron 2025 en la plej forta financa stato de la lastaj jaroj. Pro nia sukcesa laboro, la estraro nun povas memfide ekkomenci planojn por 2026:

- Rekomenci la agadon de la Eldona Fakto de E-USA.
- Plivastigi nian kapablon peti subvenciojn por eĉ pli grandaj projektoj.
- Pliigi la administran subtenon por niaj programoj kaj la venonta Landa Kongreso.



Recenzo de *Postcards, Translators, and Esperanto Pioneers*

libroj • Kartero WILLIAMS

Ĉi tiu libro celas esplori kiel ordinara esperantisto esperantumadis en la frua dudeka jarcento. Por tion fari, la aŭtoroj skizas analogion inter komunik-teknologioj kiel la poŝtkarto, kaj Esperanto – kaj demandas, kian rolon servis Esperanto por mondscivolema burĝo en 1910. Kial ordinara mezklasulo de unulingva lando volus lerni elpensitan lingvon? Mi malkaŝu: ĝuste tial, kial oni lernas Esperanton hodiaŭ.

Per liaj poŝtkartoj, la aŭtoroj subaŭskultas la konversaciojn de John Beveridge kaj liaj korespondantoj. Tiuj kartoj montras, kiel John avidis informon pri la ekstera mondo. Ni sekvas ankaŭ, kiel John enplektiĝis en la lokan movadon kaj eklaboris pri la granda projekto traduki la Novan Testamenton. En alia ĉapitro, la libro esploras la esperantumadon de la filino de Beveridge kaj aliaj virinaj

E-pioniroj. Tiuj ĉapitroj plej interesis min, ĉar ili enhavis multe da detaloj pri Esperanto-historio. Por iu, kiu vere avidas ion ajn pri Esperanto-historio, tiuj ĉapitroj verŝajne meritas aĉeton de ĉi tiu libro.

Se mi rajtas kritiki, la libro indas je iom da redaktado. La aŭtoroj ŝajne “ŝatas la sonon de siaj propraj voĉoj” kaj tio ĝenas foje. Ili emas uzi malsimplajn analogajn strukturojn pri bagateloj aŭ diri “ne nur tio, sed *tio*” kiam ne necesas. Kaj kelkfoje ili forgesas, ke io menciigis en la ĵus pasinta ĉapitro kaj ili labore ripetas ideon kiu apenaŭ menciindis la unuan fojon. Se vi legus nur ĉapitrojn 2, 3 kaj 4, vi maltrafus malmulte.

Se vi nur scivolas, ĉu la libro juste traktas Esperanton, estu kontenta, ke la aŭtoroj ŝajne bone scias multon pri nia afero kaj agrable reprezentas la lingvon.

La kvina kina jaro

kino • Alekso MILLER

En 2025, la sepa Usona Bona Film-Festivalo disdonis rekordan kvanton de monpremioj. Fakte 22 el 49 reĝisoroj (45 elcentoj!) ricevis almenaŭ cent dolarojn pasintjare. Nia organizo festis kvin sinsekvajn jarojn da konkursado kaj la produktadon de nia ducenta esperanta kurtfilmo. Ekde 2021, la festivalo entute donacis pli ol dudek unu mil dolarojn al filmfarantoj tra la mondo. Kvankam la filmoj kaj premioj certe gravas kaj imponas, eĉ pli profitaj por Esperantujo estas la oportunoj por vid-al-vida kunlaboro kaj amuziĝo en Esperanto per eventoj rilate la festivalon. Mi reliefigu kelkajn tiujn eventojn, el la pasintaj kvin jaroj, por kuraĝigi vin aranĝi similajn aferojn en via urbo aŭ dum via venonta Esperanto-kongreso.

En Barcelono, Hispanujo, la Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ) okazigis spektifeston (la 14-an de novembro 2025) por la 49 novaj kurtfilmoj kaj taksis ĉiun filmon laŭ kelkaj kriterioj. Ili poste prezentis sian propran premio-ceremonion en Instagramo. <<https://mallonge.net/1zk>> Temis pri la filmoj plej ŝatataj de la grupo laŭ verkado, aktorado, kaj tiel plu. Ili ne petis permeson aŭ aprobon por fari tion, sed simple decidis gratuli tiujn filmojn. Estas kataluno en tiu grupo nomita Oskaro, kiu decidis amuze kostumi sin kiel la Oskar-premion de Holivudo por la anoncoj. Ŝajnas, ke la spektado, taksado, kaj gratulado de la filmoj estis bonegaj grup-eventoj por tiu junularo.

Aliuloj rajtas simile aranĝi spektifeston kaj decidi inter si, kiuj filmoj estas la plej bonaj. Reĝisoro, kiu eble gajnos la 5-an oficialan premion de la ĵurianoj, ĝojos ekscii, ke en iu fora urbo, grupo de esperantistoj tie taksis ŝian filmon la plej unuaranga. Vi rimarkos en Instagramo, ke la kontoj de KEJ kaj E-USA kune afiŝis la oskaran videaĵon. Se loka klubo (ekzemple en Seatlo) farus simile, nia organizo feliĉe helpus pli da homoj trovi la aferon.

En Fortalezo, Brazilo, okazis TAKE (la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto) en novembro 2023. Mi ĉeestis kaj ricevis inviton prelegi pri la film-festivalo. Ĝi jam finiĝis tiujare do ni ne povis krei oficialan konkursaĵon. Anstataŭ tede prelegi pri la jamaj sukcesoj de la festivalo, mi decidis pruvi kiel simple, facile, kaj amuze fari filmon povas esti. Kelkaj ĵus renkontitaj kongresanoj helpis min filmi simplan skeĉon en la akceptejo kaj mi finmuntis ĝin ene de horo. Brandon Sowers, kiel nia organizo-prezidanto, rifuzis ludi la rolon de ebria stultulo, sed tion mi ne hezitis fari.

Ni prezentis la novnovan filmon “Io Problema” <<https://mallonge.net/1zl>> al klasĉambro de TAKE-anoj kaj ĉiuj ĝuis la aferon. Vi ne bezonas oficialan

konkurson por krei filmon ĉe kongreso. Uzu la vidindaĵojn kaj lokojn ĉirkaŭ la kongresejo. Homoj ofte rapidas partopreni en arta vespero kiel kantanto aŭ dancanto. Kial ne fari la samon kiel filmfaranto? Vi eĉ povos ĝui ĝin kiel spektanto apud aliaj esperantistoj. Anstataŭ aĉeti bagatelaĵon por memori la sperton, vi mem kreos senprezan memorigaĵon ĝueblan de aliaj en Esperantujo.

Dum NASK (la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto) en julio 2022, kelkaj NASK-anoj filmis kvar filmojn por la kvara festivalo: “Mia Monujo!,” “Jes, Avino,” “Hazarda Renkontiĝo,” kaj “Iamo Longe For.” Tiu lasta, reĝisorita de Aaron Fingtam, eĉ gajnis premion. Ni uzis la samajn kameraon kaj mikrofonon por ĉiu filmo kaj helpis unu la alian per aktorado kaj filmado. Ni prezentis la filmon “Hazarda Renkontiĝo” dum la fina ceremonio de la kursaro. Uzu tiujn filmojn kiel inspiraĵojn por plani vian ĉekongresan aŭ ĉekursaran kurtfilmon. Anstataŭ gajni amikon per banalaj demandoj (“Kiam vi eklernis Esperanton?” aŭ “Kie vi loĝas?”), petu helpon krei simplan originalan kurtfilmon en Esperanto. Tio estus multe pli amuza kaj interesa amikiĝo, ĉu ne?

Granda kongreso ne necesas por kreeme ekzerci vin. La kvinan festivalon en 2023 mi lanĉis per kvin-hora film-kreada evento en Atlanto, Georgio ĉe mia hejmo. Dek kvin amikoj renkontiĝis kaj ni hazarde dividiĝis en tri grupojn per nom-slipoj en bovlo por krei tri filmojn: “La Lanternisto,” “En La Kelo,” kaj “Fazeoloj.” Tiu lasta, reĝisorita de Marta Sands, poste ricevis honoran mencion kaj cent dolarojn en la konkurso. Ni uzis ĵetkubon por hazarde elekti la necesan rekviziton (kiu estis lanterno) kaj promenis al duonbruligita domo en mia najbarejo por ekfilmi scenojn. Ĉiu grupo uzis la saman simplan skripton (ĉar duono de la partoprenantoj ne parolis Esperanton) kaj post ekzakte kvin horoj, ni sidis en la sama ĉambro kaj ĝuis picon spektante la novajn filmojn. Kelkajn semajnojn poste dum Paralela Universo, miaj klubanoj en Atlanto improvize registris la filmon “La Kerno de Lanterno,” en butikoj apud la restoracio, kie ni renkontiĝis por tagmanĝo.

Se vi volas oficiale konkursi en la film-festivalo, bonege. Se inter aŭ ekster la festivaloj vi volas krei ian filmon en Esperanto, sed vi dubas, ke multe da homoj trovos ĝin, kontaktu min per la festivala Telegram-grupo <t.me/usonabona> aŭ la estraron de Esperanto-USA retpoŝte. Eble ie sur la organiza kanalo aŭ sur mia propra kanalo “Esplori Esperanton” ni trovos manieron por prezenti vian filmon al miloj da esperantistoj. Lanĉi novan kanalon kaj allogi abonantojn al ĝi estas tre longa kaj malrapida tasko. Mi esperas, ke la kanalo de Esperanto-USA helpas vin fariĝi konata kaj ĝuata pli facile en nia komunumo. Se vi simple volas registri vin laŭtlegantan anoncojn kaj artikolojn el *Usona Esperantisto*, ni povus afiŝi tiujn videaĵojn kaj ĝi multe

helpos nian komunikan strategion. Ajna ekzercado vin klerigos kaj ni bezonas pli da kleraj filmistoj en la movado.

Mi finu rakontante pri la ruĝtapiŝaj premieroj. En 2023, Sharon Powell, kiu aktoris en kelkaj konkursaĵoj, prezentis sian domon kaj ni okazigis la unuan premieron <mallonge.net/1zm> por la Usona Bona Film-Festivalo tie kun seĝoj kaj ŝvelinta balona ekrano ekstere kaj manĝaĵoj interne en la kuirejo. Esperanto-USA rekompencis nin pri la manĝaĵoj. Brandon kuiris por ni veganajn takojn kaj Keĵti Neilson muntis la grandajn fonojn kun la festivalaj emblemoj por niaj fotoj. Post ĉiu filmo mi mallonge kaj individue intervjuis la reĝisorojn kaj ili respondis al demandoj de la spektantaro. Eĉ esperantistoj kiuj ne partoprenis en la festivalo venis kaj ĝuis la eventon.

Por la festivaloj en 2024 kaj 2025, mi okazigis la premierojn en la granda kunsidejo de mia loka publika biblioteko. Estis tute senkoste uzi la ĉambron; mi simple devis rezervi la spacon du semajnojn antaŭ la evento. Estas pli sekure havi publikan eventon en publika loko (anstataŭ inviti nekonatojn al privata hejmo) kaj kompare eksteran eventon, ni ne plu devis zorgi pri la vetero. Se vi volas okazigi vian propran premieron ĉi-jare, vi devus! Ni verŝajne faros tion en Atlanto tuj antaŭ la publikigo de la filmoj. Se almenaŭ tri reĝisoroj kreos festivalajn filmojn en via urbo, mi eĉ sendos al vi laŭpete grandan fonon kun

festivalaj emblemoj por via propra ruĝtapiŝa premiero. Ĝi estas 8 futojn alta kaj 10 futojn larĝa do vi bezonos pli grandan ĉambron ol kutima salono.

Eble mi tro ofte parolas pri la festivalo kaj tro multe insistas, ke homoj konkursu. Mi faras tion ĉar mi scias kiom fragila la festivalo ĉiam estis kaj ankoraŭ restas. Eĉ kun financa subteno, la necesa organizada laboro por aranĝi kaj poluri ĉion estas multflanka kaj laciga. Ni fakte planis haltigi la konkurson en 2023 post la kvina konkurso. Nur la subita kaj neatendita subteno de Brandon Dyer nome de lia retejo ([Ana.so](#)) ŝanĝis tion kaj revenigis ĝin la pasintajn du jarojn. Mi scias, ke ĉiu festivalo, kvankam impona kaj ĝuata, povas esti la fina, do mi ne volas, ke ni malŝparu nian ĝisnunan energion.

Se vi iam ajn kreos filmon en nia lingvo, faru tion ĉi-jare, por ke ĝi estu parto de la plej granda kina projekto en la historio de Esperanto. Ne gravas se vi estas amatoro. Ĉiu esperantisto estas unika kaj havas ion specialan por prezenti al la mondo. Se vi kreos ion, ni feliĉe spektos kaj aŭskultos. Forgesu la premiojn. Mi lastatempe reĝisoris Ŝekspirajn komediojn, sciante, ke ili verŝajne ne gajnos la plej altajn premiojn. Ili simple plaĉas al mi. Kreu tion, kion vi volas spekti en Esperanto. Eble vi inspiros aliajn homojn fari la samon.

De prokrastado al la ruĝa tapiŝo

Mia iomete superreala sperto ĉe la Usona Bona Film-Festivalo

loke • David Beck

Mi estas parto de la Esperanto-komunumo jam dum multaj jaroj. Mi ĉeestis nenombreblajn eventojn, servis kiel estrarano de Esperanto USA, kaj pasigis multajn jarojn ĝuante la unikan sperton renkonti la samajn amikojn en malsamaj urboj dum parolante lingvon, pri kiu granda parto de la mondo neniam antaŭe aŭdis. Do mi supozis, ke mi jam havis sufiĉe bonan ideon, kia estas la etoso de Esperanto-evento.

Estis tute neatendite trovi min promenanta sur ruĝa tapiŝo en Atlanto, Georgio.

Ĉi-jare estis la unua fojo en kiu mi persone partoprenis en la Usona Bona Film-Festivalo — kaj krome kiel filmfaranto. Vendredo, la 7-an de novembro, trafis min kiel tre forta bato. Rekte en la ventron. Tamen mi forlasis mian skribotablon vendredon posttagmeze kaj rapidis al flughaveno LAX. Mi flugis al Atlanto sentante min ekscitita, scivolema kaj sufiĉe nervoza por serioze dubi

I've been part of the Esperanto community for a heap of years now. I've attended countless events, served as a former board member of Esperanto USA, and spent many years enjoying the unique experience of running into the same friends in different cities while speaking a language much of the world hasn't heard of. So I thought I had a pretty good idea of what an Esperanto event feels like.

What I didn't expect was to find myself walking a red carpet in Atlanta.

This year marked my first time attending the American Good Film Festival premiere in person not to mention attending as a filmmaker. Friday, November 7th hit me like when you get hit with a really hard thing. Right in the guts. Nevertheless, I left my desk Friday afternoon and scurried to LAX. I flew to Atlanta feeling excited, curious, and nervous enough to seriously question my life choices. I had

miajn vivdecidojn. Mi finfine submetis mallongan filmon, “La Hundido”, post jaroj de pensado, ke mi iam devus fari tion, kaj poste mi tre lerte ĝin ne faris.

Mia alveno en Atlanto tuj rememorigis min, kial Esperanto-eventoj estas tiel specialaj. Jeff, sperta filmfarinto de la festivalo, salutis min ĉe la flughaveno. Jeff afable gastigis min dum la unua nokto en la urbocentro de Atlanto, kun mirinda vido al la urbosilueto. Simple nekredeble!

La sekvan matenon, en la festival-tago, Chuck Mays aliĝis al Jeff kaj mi por matenmanĝo. Jeff kuiris por ni, kio estis kaj bongusta kaj afabla. Dum ni manĝis la delikatan ovaĵon, ni babilis pri la filmoj kiujn ni kreis, la Esperanto-organizaĵoj en kiuj ni aktivis (inkluzive de Esperanto-USA kaj la *Esperantic Studies Foundation*), kaj ĉio ajn pri kio Esperantistoj kutime parolas.

Post matenmanĝo, ni alfrontis la gravan taskon aĉeti deserton por la post-festo — klare la plej grava logistika decido de la evento. Poste ni direktiĝis al la hejmo de Beanz kaj Alekso, kie pluraj homoj kolektiĝis por prepari sin por la premiero. Konversacioj pri la kino, la vivo, kaj kiel ni ĉiuj iel trovis nin farantaj filmojn en Esperanto abunde fluis. Ĉi tie mi aldonos specialan dankon al ambaŭ Alekso Miller kaj Catie Neilson. Mi absolute ne kapablas fari mian filmon sen ilia skribita kaj filmita helpo.

Chuck kaj mi decidis piediri la du mejlojn al la premierejo. Tio estis agrabla parto de la semajnfino. Ni gaje babilis dum ni alproksimiĝis al la ejo, kie nin salutis, jes ja, ruĝa tapiŝo. Subite, sentiĝis kiel ĉarma Holivuda premiero en miniaturo, sed kun pli da Esperanto kaj malpli da paparacoj. Ni havis nur unu.

Interne de la kinejo, regis vera ekscito. Filmfarantoj kaj ĉeestantoj radiis elektran energion. Kvankam eble ekzistis eta spuro de amika rivaleco, estis tute klare ke ĉiuj volis, ke ĉiuj aliaj sukcesu. Temis pri la malplej egoisma filmfestivalo imagebla.

Spekti “La Hundido” sur la granda ekrano estis nervoziga. Mi sidis tie esperante, ke mia filmo digne konkursos apud la aliaj. Feliĉe, la reago de la publiko trankviligis min, precipe kiam homoj komencis aŭdeble murmuri pro la vera stelo de la filmo: mia eta blanka hundido. Ripley akceptis la atenton kun digno, kiel oni atendus de hundo kiu jam aperis sur la kovrilo de Usona Esperantisto. Kaj ne, mi ne kunportis lin.

finally submitted a short film, “La Hundido”, after years of thinking, “I should do that someday,” and then quite skillfully not doing so.

My arrival in Atlanta immediately reminded me why Esperanto events are so special. I was greeted at the airport by Jeff, a veteran festival filmmaker. Jeff generously hosted me that first night in downtown Atlanta, complete with a fantastic skyline view. Just wow!

The next morning, festival day, Chuck Mays joined Jeff and me for breakfast. Jeff cooked for us, which was both delicious and kind. Over exquisite eggs, we talked about the films we had made, the Esperanto organizations we’re active in (including Esperanto USA and the Esperantic Studies Foundation), and everything else Esperantists talk about.

After breakfast, we took on the critical task of purchasing dessert for the after-party. Clearly the most important logistical decision of the event. We then headed to the home of Beanz and Alex, where several people gathered getting ready for the premiere. Conversation about film, life, and how we had all somehow ended up making movies in Esperanto abounded. Here I will add a special thanks to both Alex Miller and Catie Neilson. I absolutely could not have made my film without their written and filmed assistance.

Chuck and I decided to walk the two miles to the premiere. A weekend highlight. We chatted cheerfully as we approached the venue, where we were greeted by, yes! a red carpet. Suddenly, it felt like a boutique version of a Hollywood premiere, but with more Esperanto and fewer paparazzi. We only had one.

Inside the theater, there was a real buzz. Filmmakers and attendees shared an electric energy. While there may have been a hint of friendly competition, it was overwhelmingly clear that everyone wanted everyone else to succeed. It was the least cutthroat film festival you can imagine.

Watching “La Hundido” on the big screen was nerve-wracking. I sat there hoping my film held its own alongside the others. Thankfully, the audience reaction put me at ease, especially when people began audibly cooing over the true star of the film, my small white puppy. Ripley took the attention in stride, as one would expect from a dog who has already graced the cover of Usona Esperantisto. Also, I didn’t bring him.

Post la premiero, la oficiala post-festo daŭris ĝis malfrue en la nokton kun videoludoj, manĝaĵoj, muziko kaj viglaj konversacioj. Ĝi estis ĝuste tia, kia oni esperus post la ceremonio: malstreĉa, ĝoja, kaj plena je la speco de kritiko, kiun oni atendus de Esperantistoj.


La sekva mateno estis kvietra resaniĝo. Post kiam tiuj, kiuj restis, milde vekigis el sia tro-festinta dormo, mi trovis por ni lokan krud-veganan restoracion, *Tassili's Raw Reality Cafe*. Ĝi ... estis ... mirinda. Ni revenis al la domo kun la manĝaĵoj. Ni manĝis kaj iom pli resaniĝis. Post kiam ni manĝis kune, ni adiaŭis unuj la aliajn. Alekso afable veturigis min al la metrostacio, kaj mi komencis mian vojaĝon reen al Long Beach per la flughaveno. Mi ne povus esti pli dankema pro la renkontoj kun novaj homoj, la revidado de amikoj, kaj la sperto de la festivalo.

Rapide, mi aldonos postskribon. Dum jaroj, mi volis submeti filmon al La Usona Bona Film-Festivalo, sed mi konvinkis min ne fari tion. Nun, post kiam mi fine faris tion, mi povas honeste diri: ĝi estas multe pli facila ol miaj nervoj igis min kredi. Se vi mem iam pripensis submeti filmon, sed hezitis, konsideru mian rakonton kaj mian sekvan konsilon. Simple faru. Vi ne bedaŭros—kaj eble vi eĉ trovos vin promenanta sur ruĝa tapiŝo, Esperanto-stile.

After the premiere, the official after-party carried on late into the night with video games, food, music, and lively conversation. It was exactly what you'd hope for after the ceremony, relaxed, joyful, and full of the kind of critique one would expect from Esperantists.

The next morning was calm recovery. After those who stayed woke gently from their over-partied slumber, I found us a local raw vegan restaurant, Tassili's Raw Reality Cafe. It ... was ... amazing. We picked up lunch and returned to the house. We ate and recovered some more. After eating together and saying our goodbyes, Alex kindly drove me to the train station and I began my trek back to Long Beach via the airport. I could not have been more grateful having met those new people, reconnected with friends, and experienced the festival.

Quickly I will add a postscript here. For years, I wanted to submit a film to the American Good Film Festival but talked myself out of it. Now that I've done it, I can honestly say, it's much easier than my nerves would have had you believe. If you've ever thought about submitting a film yourself, but hesitated, consider my story and my following advice. Just make one. You won't regret it and you might even find yourself walking the red carpet, Esperanto style.



Kiel liberigi vian internan unukornulon

beletre • Timothy BORONCZYK

Sinjoro Sanders loĝis en la sama kvartalo jam de tridek jaroj. Li komencis ĉiun tagon kun taso da forta nigra kafo, legis la ĵurnalon dum tridek minutoj precize, kaj pasigis la reston de la mateno prizorgante sian malgrandan ĝardenon. Ŝanĝado estis la malplej ŝatata afero por s-ro Sanders, kaj li kritikis ion ajn novan aŭ eksterordinaran. Lia malmola mieno gajnis al li la titolon “la plej malafabla najbaro en la kvartalo”, kiun li fiere akceptis.

Iun tagmezon, dum s-ro Sanders tondis siajn rozojn kun arma precizeco, la leterportisto metis pakaĵon sur lian sojlon. Trovante, ke ĝi estas adresita al lia najbaro, s-ro Smith, li pripensis, ĉu li mem liveru ĝin aŭ lasu la portiston prizorgi sian eraron?

Post momento da hezito, s-ro Sanders decidis, ke li ne povas rezisti la tenton rigardi en la pakaĵon. Eble li malkovros pri la nerimarkinda najbaro ion priklaĉindan.

S-ro Sanders zorge malfermis la pakaĵon kaj vidis nenion krom kolekto de ekstravagancaj libroj pri memhelpado. Li elprenis unu libron, titolitan “Kiel komunikiĝi kun domplantoj”, kaj ridis. Alia libro fanfaronis, “Kiel liberigi vian internan unukornulon”. Ĉiu titolo ŝajnis al li pli absurda ol la lasta.

S-ro Sanders fariĝis suspektema kiam li rimarkis, ke ĉiu libro enhavas manskribitan noton. Ili estis mallongaj, iom enigmaj, kaj vekis lian scivolemon, kvazaŭ ili aludas ian sekretan aferon inter s-ro Smith kaj la mistera sendinto.

Mi esperas, ke vi trovos ĉi tiun libron utila. Ĝi restu diskreta, ĉar la scio ene de ĉi tiuj paĝoj ne estas por ĉiuj. Praktiku la teknikojn saĝe, kaj neniam forgesu nian gravan laboron.

Sekrete kaj solidare,

— M.S.

Dum la sekvaj semajnoj, s-ro Sanders trempis sin en la strangajn librojn, komence per la malplej absurda, “La kaŝita potenco de via panrostilo.” Komence, li taksis la enhavon sensenca, sed li ne povis negi la efikecon de ĝia konsilo. Li provis unu el la sugestoj, transformante sian panrostilon en improvizitan fornon por kuiri frostigitan picon. La rezulto estis surprize bongusta.

Li daŭrigis per “Kiel komunikiĝi kun domplantoj”. La libro klarigis, kiel rimarki la subtilajn signalojn de plantoj, ekzemple la angulo de la folioj aŭ la koloro de la tigoj. Li komencis paroli, kaj eĉ kanti, al siaj begonioj, kaj post nelonge li rimarkis ke ili ŝajnis iomete pli viglaj.

Dum s-ro Sanders esploris la librojn, li dividis siajn strangajn aventurojn kun siaj genepoj, Emily kaj Jack, kiuj ofte telefonis lin por interparoli pri la vivo. Ilia gaja ridado kaj entuziasmo havis bonan efikon sur li, kaj iom post iom, lia kutime severa mieno komencis moliĝi.

Iun tagon, s-ro Sanders sidis ĉe la verando, provante fleksi kuleron per sia menso — ekzerco de “Telekinezo por la moderna epoko” — kiam s-ro Smith revenis hejmen de sia laboro. Kaptante la okazon, li tuj marŝis al la korto de sia najbaro, armite per la kulero kaj memhelpa libro kiel preteksto por konversacii.

“Ho, s-ro Smith!” li vokis, ŝajnigante hazardan renkonton. “Ŝajnas al mi, ke eble ni ambaŭ havas... unikajn interesojn.” Li montris unu el la libroj, serĉante reagon de s-ro Smith.

S-ro Smith estis videble konfuzita. “Ĉu vere?”

S-ro Sanders daŭrigis. “Fakte, mi lastatempe fariĝis sufiĉe lerta pri komunikado kun miaj domplantoj. Estas ege fascine. Kaj, nu, tio pensigis min pri niaj komunaj ŝatokupoj...”

“Mi ne scias, pri kio vi parolas, s-ro Sanders,” respondis s-ro Smith.

Malgraŭ la konfuzo de s-ro Smith, s-ro Sanders persistis en sia provo malkovri la sekreton, kiun li certas, ke lia najbaro kaŝas. “Lastatempe mi provis liberigi mian internan unukornulon,” li diris, “tamen, mi ne vere scias, kion tio signifas. Ĉu vi havas sperton pri tio, s-ro Smith?”

“Pri tio mi ne certas, s-ro Sanders,” respondis s-ro Smith.

Ju pli la mistero restis nesolvita, des pli ĝi okupis la pensojn de s-ro Sanders. Tamen li ĉiam kun ĝojo atendis la telefonvokojn de siaj genepoj. Rakonti la absurdaĵojn kaj aŭskulti ilian reciprokan ridadon feliĉigas lin tre multe.

Post semajnoj da malsukcesaj provoj nerekte malkovri la sekreton de s-ro Smith, s-ro Sanders decidis, ke *jam temp’* estis por provi pli rektan metodon. Li rememoris la instruojn, kiujn li legis en “Aŭdaca memfido por introvertuloj”, kolektis la librojn subbrake, kaj decideme marŝis al la domo de sia najbaro. Li frapis la pordon, kaj preparis sin finfine solvi la misteron de la enigmaj memhelpaj libroj.

“Nu, s-ro Smith,” li diris, kiam la pordo malfermiĝis. “Mi postulas, ke vi ekspliku ĉi tiujn.” Li prezentis la aron da libroj fronte al sia konfuzita najbaro.

S-ro Smith rigardis la librojn, poste s-ron Sanders, kaj fine li malrapide skuis la kapon. “Mi ne scias, de kie venis tiuj libroj. Ili ne estas la miaj, kaj mi scias nenion pri ili.”

Tiu respondo profunde seniluziigis s-ron Sanders. Li jam pretis turni sin kaj reveni hejmen, kiam subite li aŭdis laŭtan ridon. Li turnis sin por vidi Emily kaj Jack, kiuj staris ridante ĉe lia verando kun sia patrino.

“Avĉjo!” Emily alvokis. “Ni devas konfesi!”

“Jes,” diris Jack. “Ni sendis al vi la pakajon.”

Surprizite, s-ro Sanders demandis, “Ĉu vi du instigis ĉi tion ekde la komenco?”

Emily kapjesis. “Ni volis helpi vin liberiĝi de via cinika ŝelo, kaj panjo proponis tiun vantaĵon.”

La porró

kulturo • Hayden HENDRICKS

Oni ne ĉiam trinkis vinon kaj bieron kiel hodiaŭ. En antikveco, krom simplaj glasoj, homoj uzis kruĉojn, kornojn, kaj ritonojn por ebriiĝi. El tiuj antikvaj trinkujoj naskiĝis kurioza, tamen genia, inventaĵo: la *porró* (bekkruĉo).



La *porró* devenas de la romia ritono, kornoforma trinkujo kun larĝa buŝo supre kaj malgranda truo malsupre, tra kiu elfluas la vino. Preninte vinon el barelo, la trinkanto levas la ritonon, per la dikfingro malŝtopas la truon, kaj lasas la vinon flui elegante en la buŝon.

Iam inter la fino de la 14-a jarcento kaj la komenco de la 15-a jarcento ekaperis la *porró* en Katalunio. Laŭ kataluna folkloristo Joan Amades i Gelats, “la deziro doni al ĝi formon pli praktikan ol la korno kondukis al la kunfandiĝo de du apartaj elementoj — la botelo kaj la korno — kaj el tiu kuniĝo deriviĝis la *porró*. Ni povus diri, ke la *porró* estas botelo kun korno aŭ korno kun botelo.”¹

La *porró* rapide disvastiĝis tra Iberio. Alexandre Dumas, vojaĝante tra Hispanio meze de la 19-a jarcento, renkontis en Aragono lokanojn kiuj trinkis vinon el *porró*-forma botelo— la metodon ili nomis *gargallo*”. En la aragona lingvo *gargallo* signifas “forta fluado”.

George Orwell, en sia membiografio Omaĝo al Katalunio, priskribas sian renkonton kun la *porró* dum sia milita trejnado en Barcelono: “Ni manĝis ĉe longaj tabloj kaj el malpuraj ladplatoj, kaj trinkis el io terura, kiun ili nomis

“Mi scias, ke vi ne povis rezisti ion tiom absurdan,” diris la filinon.

S-ro Sanders ruĝiĝis, kaj ridis pro la lerteco de la trompo farita de siaj familianoj. Li devis konfesi, ke la tuta afero estis lerte aranĝita.

“Nu,” li diris finfine, “ŝajnas, ke vi bone konis vian avĉjon.”

Nun, s-ro Sanders ankoraŭ vivas sian simplan vivon. Li ankoraŭ trinkas sian fortan nigran kafon, legas la ĵurnalon laŭorde, kaj zorgas pri sia ĝardeno. Sed sur lia bretaro restas kelkaj el la strangaj libroj, kiel memorigilo, ke oni ne prenu la vivon tiel serioze. Kaj la titolo “la plej malafabla najbaro en la kvartalo” apartenas al iu alia.

Eble li neniam povos fleksi kuleron, sed s-ro Sanders ja liberigis sian internan unukornulon.

‘*porró*.’ *Porró* estas speco de vitra botelo kun pinta brako, el kiu verŝiĝas fluo da vino ĉiufoje oni levas ĝin; tiel oni povas trinki de malproksime, sen tuŝi la *porró*-n per la lipoj, kaj oni povas pasi ĝin de mano al mano.”

Kiel simbolo de Katalunio kaj komuna partoprenado, *porró*-oj estos aĉeteblaj kaj ĝueblaj ĉe IJK 2026, la Internacia Junulara Kongreso de TEJO. Dum unu semajno en aŭgusto, kongresanoj havos la ŝancon konatiĝi kun la lokaj tradicioj; partopreni kulturajn, sociajn, kaj edukajn programojn; kaj amuziĝi per diskejoj kaj koncertoj. La kongreson organizas la Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ), unu el la plej aktivaj junularoj en Eŭropo.

Ankoraŭ restas tempo por ekzerci viajn kapablojn je *porró*-umado antaŭ aŭgusto. Por helpi vin, mi kreis simplan instrukciaron.

La celo simplas: direktu la vinon el la kruĉo en la buŝon per glata, maldika fluo. Ne tuŝu la bekon per la buŝo. Ne makulu la ĉemizon.

- Paŝo 1: Alproksimigu la bekon al la buŝo.
- Paŝo 2: Klinu la kruĉon ĝis ekfluas la vino.
- Paŝo 3: Malrapide levu la kruĉon por plilongigi la fluon.
- Paŝo 4: Per akra movo rektigu la kruĉon, haltigante la fluon.
- Paŝo 5: Plej grave, transdonu ĝin al la sekva trinkanto—ja ekzistas la *porró* por esti dividata.

Se vi emas *porró*-umi, jam eblas aliĝi al IJK ĉe la retejo <ijk2026.tejo.org>. La dua aliĝperiodo finiĝos la 15-an de aprilo. Hastu do por sekurigi vian lokon!

1. Amades i Gelats, Joan. El *porró*. Eldonejo: La Neotipia, Barcelono, 1938

Esperanta Dankfesto en Yosemite

kongresaj raportoj • David Beck



Dum la pasinta dankfesta ferio, malgranda sed potenca grupo de dek du aventuristoj kunvenis en unu el la plej grandiozaj klasĉambroj imageblaj: Valo Yosemite. Gastigita komune de la grupoj Esperantistoj en Oranĝ-Kantono kaj Esperantistoj en Suda Kalifornio, la vojaĝo kunigis Esperantistojn kaj iliajn familiojn por longa semajnfino de naturo, konversacio, rido, kaj pli ol kelkaj doloraj muskoloj.

Nia grupo ampleksis aĝojn de 17 ĝis 81 kaj inkludis parojn, unuopulojn, kaj familiojn, kun esperantaj kapabloj variantaj de neekzistantaj ĝis fluaj. Kelkaj partoprenantoj brave restis en tendokabanoj sed aliaj elektis komfortajn hotelĉambrojn en aŭ tuj ekster la parko. Sendepende de dormaranĝoj, ĉiumatene nin renkontis majestaj granitaj muroj, freŝa montara aero, kaj la furiozaj akvoj de la rivero Merced. Yosemite ne zorgas pri tio, kiom bone vi konjugacias verbojn — sed ĝi rekompencas tiujn, kiuj aperas plene ĉeestaj.

Manĝaĵoj rapide fariĝis unu el niaj komunaj lingvoj. Bill, Brian, Dixsia, Elle, Mary Kay, kaj David ĝuis grandiozan kaj



This past Thanksgiving break, a small but mighty group of twelve adventurers gathered in one of the grandest classrooms imaginable: Yosemite Valley. Hosted jointly by the Esperantistoj en Oranĝ-Kantono and Esperantistoj en Suda Kalifornio groups, the trip brought together Esperanto speakers and their families for a long weekend of nature, conversation, laughter, and more than a few sore muscles.

Our group spanned ages 17 to 81 and included couples, singles, and families, with Esperanto skills ranging from non-existent to fluent. Some participants bravely stayed in tent cabins while others opted for cozy hotel rooms in or just outside the park. Regardless of sleeping arrangements, each morning met us with towering granite walls, crisp mountain air, and the raging waters of the Merced River. Yosemite does not care how well you conjugate verbs — but it does reward those who show up fully present.

Food quickly became one of our shared languages. Bill, Brian, Dixsia, Elle, Mary Kay, and David enjoyed a grand



memorindan dankfestan vespermanĝon ĉe la hotelo Ahwahnee. Tie ni festenis per rostita bovaĵo kaj Yorkshire-pudingo en la Granda Halo, sub lignaj traboj kaj vitralaj fasonoj. Amanda, Danielle, Esper, Melody, kaj Virgil ĝuis abundan kaj bongustan manĝon ĉe la feriejo Yosemite Bug. Enŝovita en la montetojn ekster la valo, la Yosemite Bug kreskis en ion pli ol eta vilaĝo, apartenanta al tradicio de vojflankaj gastejoj, grimpulaj hosteloj, kaj komunumaj tendaroj.

Vendrede Keoni aliĝis al ni. Ni ĉiuj kunvenis por vigla grupa vespermanĝo ĉe la restoracio Mountain Room kun la nekomparebla pejzaĝo de Yosemite Falls. Rakontoj kaj ridoj saltadis ĉirkaŭ la tablo tiel facile kiel vortprovizaj konsiletoj.

Inter manĝoj, ni ludis kartludojn, pasigis trankvilajn momentojn de pripensado, kaj ĝuis amasojn da spontana konversacio — ĉio kontraŭ fono, kiu igis eĉ simplajn frazojn sentiĝi poeziaj. Ĉiumatene mi elpaŝis tra la pordo kaj simple enspiris la solenan belecon de la valo, saturitan de la odoro de pino kaj malvarma tero.

Niaj tagoj estis plenaj je esplorado ĉe ĉiu intensnivelo. Ĉu trankvila promenado al Lower Yosemite Falls, ĉu grimpo super rokoj proksime de Mirror Lake, aŭ la intensa sed profunde rekompensa migrado laŭ la Mist Trail, preter Vernal Falls, ĝis la supro de Nevada Falls — niaj klopodoj estis multoble rekompencitaj per montara majesto kaj komunaj triumfoj.

Sur la Mist Trail David levis pinkonuson de Douglas-abio kaj prezentis historion, origine el indiana parola tradicio, rakontitan al li de arbaristo de nacia parko en la valo Yosemite kiam li estis infano. Vi povas vidi la planan rakonton ĉe la suba QR-kodo.

and memorable Thanksgiving dinner at the Ahwahnee Hotel. There we feasted on prime rib and Yorkshire pudding in the Great Hall, beneath timber beams and patterned stained glass. Amanda, Danielle, Esper, Melody, and Virgil savored a hearty and delicious meal at the Yosemite Bug. Tucked into the foothills outside the Valley, the Yosemite Bug has expanded into more of a tiny village belonging to a lineage of roadside lodges, climber hostels, and communal camps.

Friday Keoni joined us. We all came together for a lively group dinner at the Mountain Room with the unmatched scenery of the Yosemite Falls. Stories and laughter bounced around the table as easily as vocabulary tips.

Between meals, we fit in card games, quiet moments of reflection, and heaps of spontaneous conversation — all against a backdrop that made even simple phrases feel poetic. Every morning I would step out the door and simply breathe in the Valley's solemn beauty, steeped in the scent of pine and cold earth.

Our days were filled with exploration at every intensity level. Whether it was wandering peacefully to Lower Yosemite Falls, scrambling over boulders near Mirror Lake, or tackling the intense but deeply rewarding hike along the Mist Trail, past Vernal Falls, to the top of Nevada Falls, our efforts were repaid many times over in mountain grandeur and shared triumph.

It was on the Mist Trail that David picked up a Douglas Fir pine cone and shared a tale, originally from Native American oral tradition, told to him by a Yosemite Valley National Park Forest Ranger when he was a child. You can see the full story at the QR code below.



Por ekvilibro (kaj pro lacigitaj kruroj), ni travojaĝis la valan fundon per la naveda buso de Yosemite, parkis apud glacimalvarmaj akvofaloj, kaj pluveturis supren al la fama Tunnel View por tiu klasika makzel-faliga panoramo.

En la lasta tago, Elle, Esper, kaj David lasis la valon malantaŭ si, pasis la historian hotelon Wawona, kaj faris la pilgrimon al la Mariposa Grove. Tie ni malrapide vagis en respektoplena silento sub gigantaj sekvojadendroj, kiuj kviete perfektigas paciencon dum jarmiloj. La plej grandaj arboj en la mondo, ili enkorpiĝas majeston, kiun neniu monumento konstruita de homaj manoj povus reprodukti.

Bestobservadoj aldonis al la magio de la vojaĝo: cervoj paŝtantaj, sciuroj kuretantaj, korvoj grakantaj, kaj kojotoj ŝtelirantaj — memorigante nin, ke ĉi tiu tero ĉiam havis siajn proprajn loĝantojn kaj refreojn.

Dum la tuta vojaĝo, Esperanto fluus — foje hezite, foje memfide, ĉiam varme. Ekzerci sin pri la lingvo en tiel mirinda medio igis konversaciojn sentiĝi pli malpezaj kaj pli memorindaj. Erarojn estis facile forridi. Evidentiĝis, ke malmultaj aferoj ligas homojn pli rapide ol komune serĉi vorton dum starado sub miriga klifo.

Ĉiuj ni ricevis speciale faritan, memorigan pinglon, malgrandan simbolon por marki gravan sperton — tian, kiun multaj el ni portos longe post kiam la migrobotoj estos malpakitaj.

Ni venis pro la Esperanto. Ni restis pro la rilato. Kaj ni foriris kun memoroj tiel daŭraj kiel granito. Je la fino de la vojaĝo, ni revenis hejmen lacaj, dankemaj, kaj subtile ŝanĝitaj. Yosemite havas manieron fari tion. Aldonu bonajn homojn, komunajn manĝojn, kaj samideanojn — tamen neperfektajn — kaj la rezulto estas io vere speciala.



For balance (and worn out legs), we toured the Valley floor via the Yosemite shuttle, parked alongside icy waterfalls, and drove up to the famous Tunnel View for that classic and jaw-dropping panorama.

On the last day, Elle, Esper, and David left the Valley behind them, passed the historic Wawona Hotel, and made the pilgrimage to the Mariposa Grove. There we meandered in respectful silence beneath massive sequoias that have been quietly perfecting patience for millennia. The largest trees in the world, they embody a grandeur that no monument built by human hands could replicate.

Wildlife sightings added to the magic of the trip: deer grazing, squirrels scurrying, ravens croaking, and coyotes prowling, reminding us that this land has always had its own residents and refrains.

Throughout the trip, Esperanto flowed — sometimes haltingly, sometimes confidently, always warmly. Practicing the language in such a stunning environment made conversations feel lighter and more memorable. Mistakes were easy to laugh off. It turns out that few things bond people faster than jointly searching for a word while standing beneath an awe inspiring cliff.

All of us received a custom made, commemorative pin, a small token to mark a pivotal experience — one that many of us will carry long after the hiking boots are unpacked.

We came for the Esperanto. We stayed for the connection. And we left with memories as lasting as granite. By the end of the trip, we returned home tired, grateful, and subtly changed. Yosemite has a way of doing that. Add good people, shared meals, and kindred thinkers — however imperfect — and the result is something truly special.



Koran dankon al ĉiuj, kiuj povis aliĝi al ni / Special thanks to those who found it possible to join us:

Amanda, Bill, Brian, Danielle, David, Dixsia, Elle, Esper, Keoni, Mary Kay, Melody, and Virgil



Pliaj fotoj / Additional photos
<tinyurl.com/bdevxjsz>

Tradukado de NES-videoludoj al Esperanto

ludoj • Timothy BORONCZYK



Kompatinda Mario... la princino ĉiam estas en alia kastelo!

La *Nintendo Entertainment System* (NES) estis unu el la plej venditaj ludkonzoloj dum sia tempo kaj ĝi multe kontribuis al la revivigo de la usona ludindustrio post la Videoluda Krizo en 1983. Per ludoj kun famaj herooj kiel Mario kaj Link, la NES kaptis la imagojn de ludantoj tra la mondo. Tamen, malgraŭ ĝia tutmonda allogo, multaj el ĝiaj ludoj estis eldonitaj nur en la angla aŭ la japana.

La apero de personaj komputiloj en la 1980-aj kaj 1990-aj jaroj malfermis novan vojon al esplorado de videoludoj. Tio ebligis praktikon de nova hobbio, nomata **romhakado**, en kiu kodumuloj strebas kompreni la ludan funkciadon kaj modifas ĝian enhavon per siaj propraj ŝanĝoj. Ekzemple, ili anstataŭigas rolulojn, kreas novajn nivelojn, eĉ tradukas la ludon, por ke ĝi estu pli vaste alirebla.

Ĉar mi kreskis dum la epoko de NES, mi tenas fortan nostalgion pri ĝi. Al mi plaĉas ankaŭ uzi Esperanton en mia ĉiutaga vivo, do mi ekpensis, kial ne ludi la videoludojn en Esperanto? Mi trovis kelkajn jam tradukitajn ludojn, sed ili ne estis plene tradukitaj aŭ enhavis erarojn. Do, mi baldaŭ trovis min en mia propra aventuro, tradukante la videoludojn, kiujn mi plej ŝatis.

Defioj de romhakado

Ke neniuj povas legi la originalan programkodon, kiun verkis la ludprogramistoj, estas la plej granda defio de romhakado. Sen tiu fontkodo, oni devas lerni kiel la ludo funkcias per analizo de la binaraj datumoj de du

ROM-blatoj (nurlegebla memoro) en la ludkartoĉo. La program-blato PRG ROM enhavas programajn instrukciojn kaj datumojn, kaj la grafik-blato CHR ROM enhavas grafikaĵojn por la ludo, inkluzive de literoj kaj ciferoj. La eltira procezo kreas unu dosieron, kombinate la datumojn de ambaŭ blatoj, kiun oni povas legi kaj redakti per heksa redaktilo.

Eltiri nurlegeblajn datumojn mem ne estas kontraŭleĝa ago; tamen, la datumoj estas kopirajte protektitaj, kaj tial oni devas agi prudente. La koduma komunumo tre atentis pri tio. Por eviti jurajn riskojn, kodumuloj kutime disvastigas siajn ŝanĝojn kiel flikdosierojn. Tiuj flikoj enhavas nur la modifojn, ne la tutan ludkodon, kaj evitas la disvastigon de kopirajtitaj materialoj.

HEROLDO DE ESPERANTO

NOVA GAZET-LIVERISTO!

GERDA APERIS Gerda aperis en la lando. Ŝi venis el la maro. Ŝi estis bela kaj nova. Ŝi havis longajn harojn. Ŝi estis ĝoja kaj feliĉa. Ŝi estis la nova reĝino. Ŝi estis la nova prinĉesino. Ŝi estis la nova herino. Ŝi estis la nova heroino. Ŝi estis la nova reĝino. Ŝi estis la nova prinĉesino. Ŝi estis la nova herino. Ŝi estis la nova heroino.		BEAUFORT PETAS PARDONON Beaufort petas pardonon. Li estis malbona kaj mizeriga. Li estis malbona kaj mizeriga. Li estis malbona kaj mizeriga. Li estis malbona kaj mizeriga. Li estis malbona kaj mizeriga. Li estis malbona kaj mizeriga. Li estis malbona kaj mizeriga. Li estis malbona kaj mizeriga. Li estis malbona kaj mizeriga. Li estis malbona kaj mizeriga. Li estis malbona kaj mizeriga. Li estis malbona kaj mizeriga.
'MI SVENAS...' Mi svenas... Mi estas malbona kaj mizeriga. Mi estas malbona kaj mizeriga. Mi estas malbona kaj mizeriga. Mi estas malbona kaj mizeriga. Mi estas malbona kaj mizeriga. Mi estas malbona kaj mizeriga. Mi estas malbona kaj mizeriga. Mi estas malbona kaj mizeriga. Mi estas malbona kaj mizeriga. Mi estas malbona kaj mizeriga. Mi estas malbona kaj mizeriga. Mi estas malbona kaj mizeriga.	DEK BOVINOJ MUGAS MANGAS Dek bovinoj mugas mangas. Ili estas malbona kaj mizeriga. Ili estas malbona kaj mizeriga. Ili estas malbona kaj mizeriga. Ili estas malbona kaj mizeriga. Ili estas malbona kaj mizeriga. Ili estas malbona kaj mizeriga. Ili estas malbona kaj mizeriga. Ili estas malbona kaj mizeriga. Ili estas malbona kaj mizeriga. Ili estas malbona kaj mizeriga. Ili estas malbona kaj mizeriga. Ili estas malbona kaj mizeriga.	

La ĵurnalo en *Paperboy* deklamas nur la plej gravan novaĵon por esperantistoj.

Por ludi la modifitan version, ludantoj devas apliki la flikdosieron al kopio de la originalaj ROM-datumoj. Poste, ili povas ludi ĝin aŭ per imitilo en komputilo aŭ registri ĝin al kartoĉo por ludado per konzolo. Ekzistas retejoj, kiuj gastigas elŝuteblajn ludajn ROM-datumojn, sed ili enhavas leĝajn riskojn. Mi elŝutas datumojn nur de videoludoj, kiujn mi jam posedas kaj el kiuj mi povas mem eltiri ties datumojn per la taŭga aparato.

Plia defio en romhakado estas limigita spaco. Blatoj povas enhavi nur specifan kvanton da datumoj, kaj la originalaj programistoj lerte uzis la disponeblan spacon maksimume.

Kodumuloj devas labori ene de ĉi tiu limigo, kaj plie kun la limoj truditaj de la jam ekzistanta datumaro. Ekzemple, se mankas sufiĉa spaco en la PRG por aldoni grafikaĵojn de la supersignohavaj esperantaj literoj, necesas anstataŭigi tiujn per aliaj datumoj. Ekzemple, en simplaj videoludoj kiel *Super Mario Bros*, mi povis anstataŭigi literojn, kiuj ne aperas en la ludo. Sed en ludoj kiel Paperboy, en kiu mi deziris konservi la tutan alfabeton, ĉio fariĝas pli komplika. Eĉ post kiam mi anstataŭigis la literojn Q, W, X, kaj Y, mi ankoraŭ bezonis trovi pli da spaco por la ceteraj literoj. Spaco ankaŭ influas la tradukitan tekston; se tradukaĵo estas pli longa ol la originala teksto, oni devas prirabi liberan spacon de ie alie. Ĉi tio estas delikata tasko, kaj eraroj povas aŭ difekti gravajn partojn de la ludkodon aŭ kaŭzi misigon de memorlokoj (*memory misalignments*) kaj paneigi la ludon.

Metiaj iloj de romhakaj kodumuloj

La plej grava ilo por romhakaj projektoj estas fidinda imitilo, aŭ emulilo. Emulilo estas programo, kiu imitas ludkonzolon en via komputilo. Ĝi ofte provizas specialajn funkciojn, ekzemple konservitajn statojn — kiuj ebligas konservi la lud-progreson kaj facile reveni al iu specifa punkto en la ludo — kaj eraserĉilon, kiu helpas identigi specifajn datumojn en la sistema memoro dum ludado, kiel ekzemple la nombron de vivoj aŭ la aktualan ludnivelon.

Gravas ankaŭ bonfunkcia heksa redaktilo. Tiu redaktilo similas al tekstredaktilo/verkilo, sed ĝi manipulas binarajn datumojn. En heksa redaktilo, ROM-datumoj aperas kiel numeroj kaj literoj, kiuj reprezentas mikson de instrukcioj por la ĉefprocesoro (CPU) kaj memoraj datumoj. Kodumuloj identigas la reprezentadon de ludaj elementoj por kompreni kaj modifi ilin. Ofte uzata metodo por kodigi tekston baziĝas sur la pozicioj de litergrafikaĵoj en la grafik-blato. Ekzemple, la vico “A B C” povus esti reprezentata kiel “01 02 03” aŭ “42 43 44”, depende de la aranĝo de la litergrafikaĵoj. La serĉo- kaj legosigno-funkcioj de mia redaktilo bone helpis min serĉi la ĝustajn datumojn kaj trovi neuzatan spacon.

Ekzistas ankaŭ malasembliloj, kiuj provas transformi binarajn program-instrukciojn al asembla lingvo, kaj kompililoj por inversigi tiun procezon. Malasembliloj povas helpi, ke oni komprenu la internajn meĥanismojn de la ludo, sed la rezultoj ne ĉiam estas tiel bone organizitaj kiel moderna programkodo. Trovi kongruan paron de malasemblilo kaj kompililo estas malfacila tasko.

Plie, ekzistas grafikaj redaktiloj, kiuj povas modifi program-datumojn. Multaj el ĉi tiuj programoj estas malfacile uzeblaj; ili estis kreitaj antaŭ multaj jaroj por fruaj versioj de *Windows* kaj ne plu estas aktive subtenataj. La iloj por romhakado ĝenerale estas sufiĉe bazaj kaj ne tre

facile uzeblaj por la uzanto, ĉar ili havas specifan celon kaj estas uzataj de malgranda grupo de tre fakaj specialistoj.



Esperantigitaj niveloj en *Bubble Bobble*.

Miaj spertoj

Kelkaj el la videoludoj, kiujn mi tradukis, havas malmulte da teksto, ekzemple *Pac-Man* kaj *Donkey Kong*. Eĉ la fama *Super Mario Bros* ne havas multe da teksto por traduki. Oni povas demandi, kial traduki ĉi tiujn simplajn ludojn. Nu, ju pli da sperto oni havas, des pli facile oni identigas strategiojn por estontaj projektoj. Ĉi tiuj ludoj estis bonaj por lerni la ilojn kaj teknikojn de romhakado. Kaj ili jam estis tradukitaj en aliajn lingvojn, kiel la francan, hispanan, polan, kaj rusan, do kial ne ankaŭ en Esperanton?

Multaj homoj rigardas la ludon *Super Mario Bros 3* kiel la plej bonan videoludon de ĉiam. Fakte, mi bone memoras la ekscitecon kiam ĝi eldoniĝis. Do, mi certe deziris ludi ĝin en Esperanto. Bedaŭrinde, la ekzistanta traduko estis nekompleta, do mi decidis entrepreni ĝian plenan tradukon por havi la plej plenan ludsperton. Ĉar mi jam tradukos la unuan kaj trian titolojn de la serio, mi decidis traduki ankaŭ *Super Mario Bros 2*. Bonŝance, mi trovis komunumajn projektojn en la Interreto, kie kodumuloj komentis pri la malasemblita kodo de la ludoj. Tiuj notoj estis ege helpa rimedo por mi, kaj helpis min ŝanĝi detalojn, kiel la EK-kvadraton sur la mapo, potencigilojn (*power-ups*), kaj eĉ organizon de grafikaĵoj por krei pli da spaco por la esperanta teksto. Bonkvalitaj tradukoj estas raraj pro malfacilegeco, do altkvaliteco kaj kompleteco estis gravaj celoj de mi.

Kompreneble, estis defioj ankaŭ en la tradukado mem. Mi ofte diskutis kun amiko pri la ĝusta maniero traduki

vortojn aŭ frazojn, aŭ ĉu mi traduku nomojn de roluloj. Foje, mi certas, ke ŝi frustriĝis pro miaj obstinaj opinioj pri kelkaj punktoj, sed mi tre dankas ŝin pro ŝia helpo. Dum la projekto, ni ambaŭ lernis novajn vortojn en Esperanto.

Tamen, romhakada tradukado ne nur temas pri anstataŭigo de teksto kaj grafikaĵoj. Foje necesas modifi la program-instrukciojn por ŝanĝi la videoludon. Ekzemple, en *A Boy and His Blob*, la plurala sufikso estis programe aldonita surbaze je la kvanto de ĵeleeroj en la stoko. Mi devis trovi la specifajn program-instrukciojn, verki mian propran kodon por prezenti la ĝustan formon en Esperanto al kaj la adjektivo kaj substantivo, kaj poste serĉi liberan spacon por la kodo kaj anstataŭigi la originalajn instrukciojn. Kaj en *Bubble Bobble*, mi eĉ kreis proprajn Esperanto-temajn nivelojn.

@0C22			

; APPLY TO JELLYBEAN -			
; OVERWRITE EXISTING TO			
; JMP TO PLRSPC			
;			
JSR PLRSPC	20 21 CC		
NOP	EA		
NOP	EA		
NOP	EA		
@1CC31 (\$CC21)			

; CONDITIONALLY PLURALIZE THE PRECEEDING WORD AND THEN			
; ADD A SPACE			
;			
PLRSPC LDA BNIDX	; SHIFT BEAN INDEX TO USE AS	A5 98	
ASL	; QTY INDEX (QTY IS STORED AS	0A	
TAX	; 2 BYTES)	AA	
LDA BNQTY,X	; CHECK 1ST BYTE OF CURRENT	BD BE 02	
BNE PLURAL	; BEAN QTY	D0 0E	
LDA BNQTY+1,X	; CHECK 2ND BYTE	BD BF 02	
CMP #\$01		C9 01	
BEQ SPACE		F0 06	
PLURAL LDA #\$14	; "J" IS TILE OFFSET 0x14	A9 14	
STA MSGTXT,Y		99 A2 02	
INY		C8	
SPACE LDA #\$00	; SPACE IS TILE OFFSET 0x00	A9 00	
STA MSGTXT,Y		99 A2 02	
INY		C8	
RTS	; SO LONG AND THANKS FOR ALL THE FISHBEANS	60	

Nova kodo por la plurala sufikso por *A Boy and His Blob*.

Ĉar romhakado postulas multe da tempo, multaj en la komunumo elektas labori ĉefe pri videoludoj, kiujn ili pasie ŝatas. Tio klarigas la multnombrajn versiojn de *Super Mario Bros 3*. Ludoj, kiel *Q*Bert* kaj *Paperboy*, postulis fortajn kapablojn pri modifado de grafikaĵoj kaj program-instrukcioj por krei bonan rezulton. Ĉi tiuj ludoj ne estas tiel popularaj, tial neniu jam provis traduki ilin.

Laŭ mia scio, mi estis la unua por ĉi tiuj videoludoj. Tio krome signifis, ke ne estas alia en la komunumo, al kiu mi povus peti teknikan helpon. Mi estis pioniro en (mal)nova teritorio!

Nun, mi jam tradukis ĉiujn videoludojn, kiujn mi deziris, por la NES. Ja ekzistas kelkaj ludoj por la *Super Nintendo Entertainment System* (SNES), kiujn mi volus traduki, sed tiu platformo estas pli moderna, kaj miaj spertoj pri NES, ne multe helpas min kun pli nova sistemo. Mi ankoraŭ ne certas, ĉu mi havos la daŭran deziron. Sed mi povas senti fieron pri mia laboro, tradukinte dek NES-ludojn.

Konkludo

Se vi interesiĝas pri romhakado, estas bone scii, kion vi spertos. Ĉiu ludo prezentas unikan defiaron. Vi pasigos horojn lernante pri la sistema hardvaro, aŭ esplorante datumaranĝojn por grafikaĵoj, kaj poste malkovros, ke ĉi tiu scio ne aplikeblas al la problemo, kiun vi provas solvi. Ĝi estas temposuĉa kaj frustra hobio. Tamen, por tiuj, kiuj ĝuas venki defiojn, la ŝanco por fari malnovajn ludojn novaj kaj interesaj povas esti tre rekompensa. Mia kontenteco venas de la scio, ke altkvalitaj Esperanto-tradukoj de kelkaj el miaj plej ŝatataj videoludoj nun ekzistas.

Se vi volas ludi videoludojn en Esperanto, mi rekomendas, ke vi vizitu *romhacking.net*. Tie mia uzantnomo estas BluePhoenix, do vi trovos miajn tradukojn en mia profilpaĝo. <romhacking.net/community/6334/> Se vi ludas kaj ĝuas ilin, bonvolu konsideri lasi recenzon aŭ dividi ilin kun viaj amikoj, por ke pli da homoj povu ĝui ĉi tiujn klasikaĵojn de NES en Esperanto.

Frua adoptanto de teknologio

Samsung Galaxy Z TriFold

eseo • Efraín PEDROZA

La *Consumer Electronics Show* (CES) okazis de la 4-a ĝis la 8-a de januaro 2026 en Las Vegas, Nevado. Oni povas diri, ke la nova epoko de faldeblaj inteligentaj poŝtelefonoj finfine alvenis! Samsung prezentis la unuan tian inteligentan poŝtelefonon iam venditan en Usono, kiu povas faldiĝi dufoje sur si: la Samsung Galaxy Z TriFold.



Kiam la Samsung Galaxy Z TriFold estas plene disfaldita, la ekrano havas imponan 10-colan diagonalon. Mi povas sekure diri, ke ĉi tiu interna ekrano estas tabulkomputil-granda. La ekrano de la baza iPad de Apple mezuras 11-colojn diagonale. Teme de tabulkomputilo, la Samsung Galaxy Z TriFold ja subtenas sendratajn periferiajn aparatojn, kiel klavaron kaj muson, plibonigante la sperton kvazaŭ pri tabulkomputilo.

Sed ĉu la granda interna ekrano vere permesas al uzantoj interagi kun sia telefono laŭ novaj manieroj? Jen kie mi komencas demandi min, ĉu aplikaĵ-programistoj vere novigos kaj kreos novajn, ekscitajn manierojn plene utiligi tabulsimilan internan ekranon? En mia ideala mondo mi povus uzi la kovrilan ekranon, kiu mezuras 6,5-colojn, kiel ordinaran telefonon. Mi povas malfermi mian telefonan aplikaĵon por fari rapidan vokon, rulumi tra filmetoj aŭ tekstoj en TikTok kaj Instagram, aŭ plenumi miajn ĉiutagajn Esperanto-lecionojn per Duolingo. Tamen, tiam, kiam mi malfermas la internan ekranon ĝis ĝiaj plenaj 10-coloj, mi volas IMPONAN sperton.



Mi bonvenigus, se la Android-version de la Duolingo-aplikaĵo estus disponebla en du formoj por la Samsung Galaxy Z TriFold. La unua versio adaptiĝus al la kovrila ekrano de 6,5-coloj. Tamen, kiam mi malfermas la internan ekranon ĝis la plenaj 10-coloj, mi volas, ke aperu nova uzantinterfaco, en kiu la poŝtelefona aplikaĵo funkcias en labortabla reĝimo.

Ekzemple, jen unu el miaj ideoj: kiam la telefono estas malfaldita al sia 10-cola interna ekrano, la kutima poŝtelefona aplikaĵo Duolingo aperu sur unu panelo. En la dua panelo aperu areo por noti erarojn aŭ demandojn, kiujn ni eble havas. Kaj fine, sur la tria panelo montriĝu aŭ komunuma interfaco, kie oni povu interagi kun aliaj lernantoj de Esperanto en reala tempo, aŭ — se integri interagan komunuman panelon estas tro ambicia — panelo, kiu donu detalajn gramatikajn notojn pri la frazoj, pri kiuj ni devas ekzerciĝi. Mi instigas ĉiujn produktmanagerojn ĉe Duolingo rimarki ĉi tion.

Ĉi tio estas nur la unua ripeto de ideo, kiu povus doni al ni tiun mirindan sperton per faldebla inteligenta poŝtelefono. Mi afiŝos ĉi tiun blogaĵon, kiu estas skribita en Esperanto, en la esperanta subredito kaj pro tio mia ekzemplo specife alvokas Duolingo-lecionojn pri Esperanto. *Sorry, not sorry.*

Mi estas uzanto de iPhone. Mi ĉiam estis, ekde la lanĉo de la iPhone 5s. Tamen, mi planas aĉeti la Samsung Galaxy Z TriFold kiel duarangan aparaton. Mi volas mem eksperimenti kaj vidi, kian lingvolernadan aplikaĵon mi povas disvolvi, kiu funkcias kaj kiel poŝtelefona aplikaĵo en la 6,5-cola reĝimo kaj kiel plena skribtabla aplikaĵo en la malfaldita 10-cola reĝimo. Kun la kresko de agenta AI, mi planas krei multajn prototipajn aplikaĵojn per “*vibe coding*”. Mi scias, ke ne estos facile, sed vera novigado ĉiam postulas malfacilan laboron. Dum mi komencas ĉi tiun vojaĝon en tri-faldaj poŝtelefonaj aplikaĵoj, mi memoras tion, kion oni instruis al mi en la mezlernejo: “Se vi ne sukcesas komence, vi estas en bona kompanio.”



Kion vi opinias pri la venonta Samsung Galaxy Z TriFold? Ĉu vi entuziasmas provi ĝin mem? Ĉu vi opinias, ke la faldebla poŝtelefono estas tendenco, kiu malaperos post kelkaj jaroj? Mi volas scii viajn pensojn! Kontaktu min per la paĝo “*Contact Me*” de mia retejo.

thatpolyglot.com/contact

La mondo bezonas nin

Kiel usonaj esperantistoj povas fari bonon en la mondo hodiaŭ?

informado • Alena ADLER

Ĝisdatigo pri Asocio Nova Familio kaj ties Orfejo Klara Zamenhof



Pasintjare ni publikigis kelkajn leterojn de esperantistoj, pri ilia subteno de la infanoj orfiĝintaj de milito, kiujn ANF prizorgas en Goma, DR Kongo, kaj rezulte, pluraj novaj donacantoj el la legantaro komencis subteni la organizon pri la bezonoj de la 215 infanoj sub ties prizorgo.

Per la helpo de bonkoraj donacantoj, unu el la zorgatoj, Salama, povis ricevi urĝan apendicektomion en Marto. Nun Bertin kaj Célestine, suferantaj de la kronika kondiĉo falciĉela anemio, estas grave malsanaj, aparte Bertin, kiu eniris la urĝejon. Mankas **1 480 \$** por pagi ilian medicinan prizorgon.

Eĉ malgrandaj mondonacoj povas tre helpi, se suface multaj engaĝiĝos laŭ ties rimedoj. Pri la lernejaj kostoj de la 70 infanoj, kiujn ANF klopodas subteni al la lernejo ĉi jare, ANF plu ŝuldas **1 000 \$** pri la unua trimestro, kaj **5 400 \$** pri la dua trimestro. Tro baldaŭ alvenos la tria trimestro, kaj ties kotizo de **5 400 \$**, do entute **11 800 \$** por ke tiuj infanoj ĉiuj finu la lernojaron kaj trapasu bezonatajn ekzamenojn por pluiri en la lernejo. Pro la necesa prioritato de la plej bazaj bezonoj de la infanoj, ANF povis sendi nur trionon de la zorgatoj en la lernejon ĉi jare kaj tamen la mono por la kotizoj mankas.

Ankoraŭ ne estas usona organizo por helpi donacantojn ĝiri monon al ANF. *Usona Esperantisto* lernis de Betti Maul en Germanujo pri germana konto kiu ĝiras monsubtenon internacie al ANF. Vi povas legi pri tio, kiel sendi monon al ANF en Esperanto, la germana, la angla, kaj la franca. (*Supozante ke la banktransdonilo postulos adreson, la organizanto de tiu konto por ANF estas: Andreas Diemel, Bismarckstr. 168, 47057 Duisburg.*) <esperanto.de/eo/enhavo/kiel-send-i-la-monon-wie-s-penden-how-send-money-comment-envoyer-largent/>

Pri denova inundo ĉe Vinilkosmo

En la 11-a de Februaro dua severa inundo trafis Vinilkosmon, ĉefeldonejon de esperantlingva muziko. Nur semajnon poste, por aldoni al la katastrofo, la tuta katalogo de muziko portempe malaperis el la retaj platformoj, pro neatendita prokrasto en la subskribo de kontrakto kadre de la nova bita distribuanto, kaj planata kontraktfiniĝo kun la antaŭa distribuanto.

Vi povas aĉeti muzikon kaj tiel subteni Vinilkosmon, kaj la artistojn kiuj kreas por ni la muzikon kiu riĉigas nian esperantan kulturon, almenaŭ per la retejo de Vinilkosmo mem. <vinilkosmo.com/eo> Dume, iom post iom la muzika katalogo revenas en la kutimajn platformojn (*Apple, Spotify, Deezer, Tidal, ktp*) per la nova bita distribuanto, *Booster Music*.



Postskribo de Asocio Nova Familio:

Gekaraj, ni ĉiam diras ke la individuaj helpoj limiĝas. Tial ni ANF-anoj ĉiam esperas, ke ANF ne plu havos malfacilaĵojn, kiam ĝi trovos firmaojn, fondaĵojn aŭ riĉulojn eĉ neesperantojn por financi efike kaj regule. Ĉu vi bonvolus klopodi tiucele? Ĉu vi bonvolus pluinformi viajn geamikojn, ankaŭ neesperantistojn pri nia ANF? Ĉar helpemaj homoj estas ĉie.

Pliaj informoj pri la faroj de ANF:

<https://docs.google.com/presentation/d/1H6dFK3wFE1Ca1SMd-XKGEZY5IJfBT_AE4NpE_wjieaw/edit>

